


1986 septembro
79a jaro
n-ro 969 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Vi trovos,

ke la trimonata ferio, somera aŭ vintra (depende de tio, ĉu vi frostetis en Nov-Zelando aŭ ŝvitis en Finnlando), kiun vi devis pasiĝi sen ĉi tiu revuo — finiĝas jen, finfine! La revuo do ne ĉesas aperi, kiel iuj (naive aŭ malice) eksupozis. Male eĉ: ni en la kunflikita redakcio nun pretas superŝuti vin per kvar revunumeroj en du monatoj ĝis la jarfino. Rezervu tempon por legi! Cetere, post la subita (kvankam komprenebla) kapitulaco de la antaŭa redaktoro, post la decido ŝanĝi la kompostejon, post dungo de nova grafikisto kaj provizora reelfoso de antikva redaktoro, — ni bezonis iom da tempo por kapti kaj rekapti la fadenojn de la revufarado. Atente studu ĉi tiun numeron kaj vi rimarkos, ke ni sukcesis. Ni pruvos tion al vi definitive en la sekvaj numeroj. Intertempe reelfosu vian malnovan fidon al nia revuo. Ĝi meritas tion. Ankaŭ vi meritas pli bonan kaj pli akuratan revuon, ol vi havas tra kelkaj lastaj jaroj kaj monatoj. Ni ĉi tie denove bonhumoras. La samon al vi!

Enhavo

- 141 71a Universala Kongreso de Esperanto: Ĉinio kaj Esperanto — reciprokaj esperoj (S. Milojević)
- 142 Solena Inaŭguro: Majesta inaŭgura solenaĵo
- 143 Kongresa rezolucio: Per interkompreniĝo al paco
- 145 Parolado de s-ro Huang Hua: Ĉinio devas fari pli por Esperanto
- 146 Inaŭgura parolado de d-ro Tonkin: Paco estas pli ol manko de milito
- 148 Solena Malfermo: Defilo de tutmondeco de UEA
- 149 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: Novaj komitato, estraro, prezidanto (Osma Buller)
- 150 Komitata rezolucio: Subteni la Movadon en Ĉinio
Internacia Kongresa Universitato: Ye: IKU servas por spirita interproksimiĝo
- 151 La Tago de la Paco: Arte kaj aferece pri la kongresa temo (Yosimi Umeda)
- 152 Belartaj Konkursoj de UEA 1986: Rezultoj
- 153 Nacia kaj Folkloro Vesperoj: Triumfo de artismo (D.L. Masterman); Koncerto de J. Rabu: Brave, Joëlle! (S.M.)
- 154 Teatro: Vida Jerman kiel Verda Majo
9a Esperantologia Konferenco: Kuraĝa alfronto de tikla problemaro (Rob Moerbeek)
- 156 La Tago de la Lernejo: Esperanto — ne same facila por ĉiuj (Yosimi Umeda); Kelklinie pri... (mallongaj kongresaj notoj)
- 158 Solena Fermo: La vorto *laboro* estas naŭlitera — *kunlaboro*
- 160 Kongreseroj... (gajaj kaj similaj prinotoj)

La kovrilo

Amaso da ĉinaj vizaĝoj sur la kovrilo ĉi-foje. En Pekino estis eĉ pli multe da ĉinaj vizaĝoj, en la Kongreso kaj — precipe — ekster ĝi. La tutan pompon de la Solena Inaŭguro de la 71a UK ni vorte pri-pentras sur la p. 142. Sed tiuj vizaĝoj sur la kovrilo — tio estas plimalpli la tuta pekina LKK, tiuj kiuj pleje ŝvitis por sukcesigi la Kongreson. Ili sukcesis. La kongresanoj aplaudis al ili en la Solena Fermo. Nia kovrilpaĝa arango estas ankaŭ siaspeca aplaŭdo al tiuj diligentuloj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.
Teleksa: 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.**
Voĉlegata por blinduloj.

Redaktas: O. Buller kaj S. Milojević.
Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150.
Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%.

Eksterakviritaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuj ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.

Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 828 6603.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; tel. (1) 42 37 14 73.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Otó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung. tel. (1) 316-423.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecilia 610, I-55029 S. Stefano di Moriano, Italio. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstoneaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.



71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Ĉinio kaj Esperanto — reciprokaj esperoj

Kun 2 482 aliĝintoj el 54 landoj, la 71a Universala Kongreso de Esperanto, de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986 en la ĉina ĉefurbo Pekino, estas la dekunua plej granda UK en la tuta historio de la Esperanto-movado. Ĝi estas ankaŭ la plej granda ekstereŭropa UK kaj la plej granda internacia kongreso iam ajn okazinta en Ĉina Popola Respubliko. Jam tiuj tri rekordoj sufiĉas por garantii al la 71a UK eminentan lokon en la historio de la Internacia Lingvo. Tamen, tiun historion eniros ankaŭ la fakto, ke ni bezonis 99 jarojn ekde la apero de la Unua Libro kaj 81 jarojn de post Bulonjo-sur-Marco, por "kuraĝi" kongresi en la plej homplena lando sur la tergloblo. Tia malkuraĝo ne rajtus esti atributo de movado, kiu pretendas porti mondan revolucion al la sfero de la internacia komunikado.

La 71a UK estis unu el la plej sukcesaj manifestacioj en nia historio. Ni emas forgesi la bazan celon de niaj Kongresoj, kiuj "estas internacia manifestacio de la esperantistaro" por "progresigi la Movadon". Se ni memoras tion, facilas konkludi, ke estis granda sukceso jam la fakto, ke ni decidis kongresi

en la lando, kiu tra la lastaj jaroj spertas la plej atentindan progreson de sia E-movado, en la lando, kie tiu movado estas plene rekonita kaj forte subtenata de la tuta socio, en la lando, kiu plurkampe pioniras en la praktika aplikado de la Internacia Lingvo. La 71a UK klare montris, ke Ĉinio estas la plej granda espero de Esperanto, samkiel la zamenhofa lingvo estas unu el la ĉefaj esperoj de la evoluanta, malkliŝe pensanta, revolucia Ĉinio.

Ah, jes, la 71a UK estis sendube ankaŭ unu el la organize plej malfacilaj Kongresoj, ĉar: malvastis la kongresejo, mankis sperto pri tiel amasa evento, burokratismo tie ankoraŭ tronas, turismo ĵus eniris la bazan lernejon. . . Aliflanke, miloj da ĉinoj unuafoje utiligis Esperanton, pluraj dekoj da milionoj da ĉinoj unuafoje aŭdis pri ĝi, ni fine portis al Ĉinio la tutan miraklon de la zamenhofa lingvo kaj homa digno sur la kampo de la interpopola kompreniĝo. Ĉar nia Movado ja ne konsistas el dorlotitaj turistoj sed el anoj de revolucia, "diligenta kolegaro", la 71a Universala Kongreso de Esperanto estis plena trafo kaj brila sukceso. sm

Majesta inaŭgura solenaĵo

La Solena Inaŭguro de la 71a Universala Kongreso de Esperanto, la 27an de julio 1986 en la Ĉina Teatro en Pekino, estis unu el la plej memorindaj kaj plej sukcesaj solenaĵoj spertitaj en la longa historio de la Movado. Ne temis unuavice pri la salonego (ja impona kaj konvene, kvazaŭ diskrete, simple kaj efektive ornamita). Ne temis — aŭ ĉu ja temis? — pri svarmo da ĉinaj dignuloj kaj oficialuloj, kiuj honoris la Kongreson per sia ĉeesto: el 46 membroj de la Honora Komitato de la Kongreso — preskaŭ duono ĉeestis la Inaŭguron. Ĉu temis pri la sobra longeco de la paroladoj, noveco de la parolantoj, pri la delikateco de la muzikaj interludoj, pri la perfekteco de la teknika fluo. . . ? Temis certe pri feliĉa kunkombino de ĉiuj ĉi kaj de multaj aliaj elementoj, kiuj kunkreis unikan kaj surprizan etoson, pri kiu eĉ la organizantoj nur revis. Tiu etoso de la pekina Inaŭguro kun pli ol 2 000 homoj el 54 landoj, tiuj etosoj, kiuj en similaj okazoj estiĝas en niaj Kongresoj — estas tiu definitiva kialo, pro kiu ni, jam en la Movado, restas en ĝi. Tiu kongresa etoso, kiu helpas al ni esperantistoj senti nin, eĉ se dum mallonga tempo tamen plene en realo, aparteni ne al 54 gentoj sed al la homaro, tio estas la ĉefa valoro de la Internacia Lingvo, tio estas aŭ devus fariĝi ankaŭ nia ĉefa kaj decida argumento favore al la Zamenhofa lingvo. Tio do regis kaj reĝis en la Solena Inaŭguro de la 71a UK en Pekino, tio tie estis majesta.

Kiam post la tradicia akcepto la honoraj gastoj kaj diplomatoj eniris la salonegon, kiam la Estraro kaj membroj de la Honora Komitato okupis siajn lokojn sur la podio, la silenton de tiu solena momento rompis la potenco de 66-voĉa koruso. Tiu bulgara-ĉina koruso surprize aperis sur la leviĝanta planko de la orkestra parto de la scenejo, antaŭ la podio. Ni pensis dum sekundo, ke la ĉinoj jen denove regas nin per unu el siaj magiaĵoj. Sed vigla interpreto de La Himno atentigis nin, ke temas ja pri realo. Kiam la korusanoj, pompe vestitaj en nigro-blanko (viroj) kaj bluo aŭ ruĝo (virinoj), malrapide komencis "sinki" en la orkestron, al la mikrofono direktiĝis Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

"Altestimataj gastoj, tre karaj kongresanoj! Ape-
rante antaŭ vi jam por la sesa sinsekva fojo, preskaŭ kiel tradicia inaŭguranto de la Universalaj Kongresoj, mi petas permeson ĉi-foje unuavice saluti kaj danki la Altan Protektanton, s-ron Peng Zhen, prezidanton de la Konstanta Komitato de la Tutlanda

La prezidanto kaj la honoraj gastoj dum la Solena Inaŭguro de la Kongreso: Grégoire Maertens (sur la apuda foto), Huang Hua (meze) kaj Chu Tu-nan.



Popola Kongreso de Ĉina Popola Respubliko, kiun ĉi tie reprezentas s-ro Huang Hua, prezidanto de la Honora Komitato de la 71a Universala Kongreso de Esperanto. . . Kun pli ol 2 400 aliĝintoj, tio ĉi estas unu el la plej grandaj Universalaj Kongresoj. Ĝi estas la plej granda Esperanto-manifestacio okazinta ekster Eŭropo. La 71a Universala Kongreso de Esperanto estas samtempe la plej granda internacia kongreso iam ajn okazinta en Ĉina Popola Respubliko."

Maertens atentigis, ke ni per ĉi tiu kongreso kvazaŭ fermas la unuan jarcenton de la Internacia Lingvo kaj inaŭguras la tutmondan prifestadon de la centjariĝo de Esperanto. "Estas aparte konvene, ke ni komencas tiun novan etapon per ĉi tiu Kongreso, kies ĉeftemo estas 'Interkompreniĝo, paco, evo-



Chen Haosu, vicurbestro de Pekino: "Brila perspektivo aperos en la dua jarcento de Esperanto."



luo'. Tiuj tri vortoj, tiuj tri nocioj, esprimas la tutan esencon de la agado por la Internacia Lingvo." Maertens poste omaĝis la antikvecon kaj riĉecon de la ĉina kulturo. Li surprizis verŝajne ankaŭ la plej erudiciajn ĉinojn per la memorigo pri la grava rolo, kiun en la 17a jarcento ludis en Pekino la belga misiisto kaj sciencisto Ferdinand Verbiest (1632-1688), kiu estis direktoro de la Astronomia Observatorio kaj prezidis imperiestran konsilantaron pri matematiko en Pekino. La prezidanto de UEA atentigis, ke la teknikaj kaj materiaj kontaktoj inter Ĉinio kaj la resto de la mondo multe progresis de post la tempoj de Marco Polo kaj Verbiest, sed ke la spiritaj kaj kulturaj interfluoj ankoraŭ restas mezepoke magraj kaj supraĵaj. Li emfazis, ke tial ekzistas la Internacia Lingvo kaj ke ni tial kongresas en Ĉinio.

Nome de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Loka Kongresa Komitato salutis prof. Chen Yuan, kiu i.a. diris: "Mi estas konvinkita, ke la Esperanto-movado ne pre akiros pli kaj pli da subtenantoj en la dua jarcento de siaj ekzisto kaj evoluo, ke ĝi akiros pli kaj pli vastan aplikadon kaj pruvos sin efika interkomprenilo por la internacia socio. . . Antaŭ 64 jaroj (tio estas en la jaro 1922), la ĵus forpasinta pioniro de la ĉina Esperanto-movado, s-ro Hujucz, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, citis faman epigramon en sia verko *La idealo kaj realo de internacia lingvo*, nome: 'Nun en Esperantujo la suno neniam subiras', kiun mi transdonas al vi, ĉiuj ĉeestantoj de la Kongreso, kaj mi kredas, ke la epigrama meritas vian aplaŭdon." Kaj, efektive, la kongresanoj aplaŭdis al tiu sprita parafrazo de la pli fama kaj

KONGRESA REZOLUCIO:

Per interkompreniĝo al paco

La 71a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986 en Pekino, kun 2 482 kongresanoj el 54 landoj,

traktinte kiel kontribuon al la Internacia Jaro de Paco la kongresan temon "Interkompreniĝo, paco, evoluo",

emfazas la bezonon de efika internacia lingva komunikado en spirito de egaleco por interkompreniĝo inter diverslingvanoj kaj homoj kun malsamaj mondkonceptoj,

elstarigas la fakton, ke progreso de la homaro en la materia, socia, kultura kaj teknika evoluoj eblas

nur sub kondiĉoj de daŭra kaj stabila paco bazita sur plena interkompreniĝo,

notas kun kontento la favoran eŝon kaj subtenon, kiun trovas la Kongreso flanke de ĉinaj aŭtoritatoj en la registaro kaj en politika, kultura kaj scienca rondoj,

substrekas la fakton, ke la Internacia Lingvo Esperanto povas efike kontribui al la pliprofundigo de la ligoj inter aziaj landoj, kaj inter Azio kaj aliaj kontinentoj, kaj

alvokas al la registaroj, ke surbaze de la Rezolucio 23/11.11 de Unesko favore al la Centjara Jubileo de Esperanto ili donu apogon al la Internacia Lingvo kiel rimedo de internacia intelekta interŝanĝo, precipe por scienc-teknika progreso de la evolulandoj.

ne plu reala diraĵo pri la Brita Imperio, konsciante, ke la eldiro de Hujucz nun estas multege pli proksima al la realo ol ĝi estis en 1922, grandparte ankaŭ pro la meritoj de Ĉinio.

Tiam sekvis sobra kaj inspira salutparolado de la prezidanto de la Honora Komitato de la 71a UK, s-ro Huang Hua, antaŭa ĉina ministro pri eksteraj aferoj, antaŭa ambasadoro de Ĉinio en Unuiĝintaj Nacioj, nun vicprezidanto de la Konstanta Komitato (prezidantaro) de la Tutlanda Popola Kongreso (parlamento) de Ĉinio. Fragmentojn el tiu parolado de unu el la plej eminentaj altranguloj, kiuj parolis en niaj Kongresoj, vi trovas akompane al tiu ĉi raporto.

Alia vicprezidanto de la ĉina parlamento, s-ro Chu Tu-nan, verŝajne la plej verva apoganto de Esperanto inter la ĉinaj eminentuloj, salutis la Kongreson nome de la ĉina societo Amikoj de Esperanto, kiun li gvidas. Chu Tu-nan diris pri tiu societo, ke ĝi konsistas el eminentaj personoj de diversaj vivosferoj. "Inter ili troviĝas sciencistoj, literaturistoj, artistoj, sociaj agantoj kaj aliaj famuloj. Ili ĥavas altnivelajn sciojn, ĝuas socian renomon kaj povas vaste influu en la amasoj. Ĉiuj membroj de la societo, kvankam nur kelkaj el ili lernis Esperanton, bone scias, ke la lingva diverseco estas forta ĝeno kontraŭ la homa progreso. Por forigi tiun ĝenon necesas internacia lingvo. La centjara historio de la internacia Esperanto-movado atestas, ke Esperanto entenas la altan idealon de la popoloj el ĉiuj nacioj de la mondo por harmonie kunekzisti, reciproke kompreni unu la alian kaj kune krei feliĉan vivon. Ni do povas diri, almenaŭ rilate la amon al Esperanto, ke ankaŭ ni estas 'samideanoj' de la tutmonda esperantistaro." Verdire, Chu Tu-nan sonas pli konvinkita pri la valoro de Esperanto ol multaj parolantoj de la Internacia Lingvo. Tial en sia dankvorto al s-ro Chu Tu-nan la prezidanto de UEA diris: "Gratulon al la prezidanto de la societo Amikoj de Esperanto! Ni devas disponi en ĉiu lando pri tia influa kaj grava kolektivo, kiu havas la samajn ideojn kiel ni kaj subtenas nian agadon."

Maertens tiam prezentis la personojn sur la podio, kie ĉe la prezida tablo sidis kvin aliaj estraranoj (ne estis en Pekino: Corsetti, Lindblom, Ragnarsson), prezidanto de TEJO, ĝenerala direktoro de UEA kaj ankaŭ: Huang Hua, Chu Tu-nan, Chen Haosu (vicurbestro), Ye Laishi (LKK-prezidanto), Chen Yuan, Zhang Qicheng (LKK-vicprezidanto) kaj Ye Junjian (rektoro de IKU). La prezenton sekvis omaĝo per ekstaro kaj momenta silento al la forpasinta prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo kaj vicprezidanto de la ĉina parlamento, s-ro Hujucz.

Kiam la juneca Chen Haosu komencis sian paroladon, nome de la Pekina Registaro (kies vicprezidanto li estas), li faris tion en aparte bona kaj laŭta

Esperanto. Kvankam li post kelkaj frazoj transiris al la ĉina, li rikoltis tondran aplaŭdon. Tre malmultaj ĉeestantoj konsciis, ke tiu 44-jara politikisto estas filo de la fama marŝalo Chen Yi (1901-1972), iama ĉina vicĉefministro, renoma poeto, kiu en 1963 iniciatis la inviton de Universala Kongreso al Ĉinio. Chen Haosu deklaris: "Mi komprenas la idealon kaj kredon de Zamenhof. . . Ĉinio kaj ĝia ĉefurbo Pekino partoprenas en nia Movado jam de la komenco de la 20a jarcento. Multaj gigantoj de la ĉinaj kulturaj rondoj sinofere klopodis kreskigi la arbedon de Esperanto. Kaj nun, kiam nia lando eniras novan historian periodon kaj komencas praktiki sian malferman politikon, Esperanto fariĝis impona arbeĝo sur la ĉina tero. . . Brila perspektivo aperos en la dua jarcento de Esperanto. . . . Mi sincere deziras al vi, karaj samideanoj, plenan sukceson en la Kongreso kaj en la estonteco!"

La juna muzikistino He Shufeng regalas tiam la Kongreson per muzika peco interpretita sur bivo, tiu orienta kordinstrumento, kiu kapablas soni kvazaŭ



temus pri tuta orkestro. Poste la prezidanto anoncas laŭvice la ĉeestantajn diplomatojn. Parolis al la ĉeestantoj: s-ro W. Wolte (Aŭstrio, ambasadoro), s-ino L. Magalhães Rego (Brazilo, konsilisto), s-ino E. Tigerstedt-Tähtelä (Finnlando, aferŝarĝito), s-ro L. Hajdu (Hungario, aferŝarĝito), s-ro R. López del Amo (Kubo, ambasadoro) kaj s-ro J. Sierek (Pollando, konsilisto), kiu salutis en Esperanto. Honoris la Kongreson per sia ĉeesto: s-ro Faetherstone (Britio, scienca kunlaboranto), s-ro E. Eller (Germana DR. aferŝarĝito), s-ro G. Ghafli (Irano, sekretario

pri kulturo), s-ro A. Sabbatini (Italio, unua sekretario) s-ro S. Yamato (kultura konsulo), reprezentanta s-ron Y. Nakae (Japanio, ambasadoro), kiu ĉeestis la komencon de la inaŭguro, s-ro J. Diniĉ (Jugoslavio, konsilisto), s-ro S. Ley Lopéz (Meksikio, dua sekretario), s-ino G.M.B. Mulder (Nederlando, sekretario pri kulturo), s-ro Stefanov (Bulgario, unua sekretario), s-ro K. Burski (Pollando, konsilisto), s-ro K. Nilsson (Svedio, unua sekretario) kaj s-ro Mayer (Svislando, konsilisto). La Evoluprogramon de Unuiĝintaj Nacioj reprezentis s-ino P. Boerma kaj s-ro H. Sakaguĉi. Parton de la inaŭguro ĉeestis s-ro A. Conze (FR Germanio, kulturataŝeo).

S-ro Lin Sin San, aganta ĝenerala direktoro de Radio Pekino, eluzis la privilegion por rekte alparoli multnombrajn aŭskultantojn de la Esperantaj elsendoj, kiujn Radio Pekino disaŭdigas pli ol 20 jarojn al pli ol 50 landoj. Li konstatis, ke "la lingva diverseco forte ĝenas la interkomprenon de la homoj kaj pli grandan progreson de la socio, sed Esperanto jam donis praktikan ekzemplon por forigi la ĝenojn."

D-rino F. Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, menciis la alvenon de multaj telegramoj kaj skribaj salutoj, i.a. de J. Borger (estro de la parlamenta opozicio de Nov-Zelando) kaj P. Asterman (UNICEF). Ŝi legis la salutojn de Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, Ĉina Asocio por Akcelado de Internacia Amikeco kaj de s-ro Bakin (membro de la Honora Patrona Komitato de UEA), kiu skribis i.a. "Pro malbona sanstato, mi kun granda bedaŭro ne povas ĉeesti la longe sopiritan Universalan Kongreson en Pekino. . . Kiel amanto de Esperanto, mi elkore deziras, ke nia Kongreso multe antaŭenpuŝu nian Movadon mondscale per siaj brilaj sukcesoj."

D-ro Tonkin koncize kaj elegante prezentis la kongresan temon "Interkompreniĝo, paco, evoluo". Tiun tekston vi trovas aliloke en ĉi tiu revuonumero. Tiam s-ro Maertens refoje dankis al la honoraj gastoj kaj bondeziris al la kongresanoj agrablan kaj ĝuindan restadon en Ĉinio. La Solena Inaŭguro de la 71a UK finiĝis, sed ĝiaj ĉeestintoj ankoraŭ longe memoros ĝin. sm

PAROLADO DE S-RO HUANG HUA

Ĉinio devas fari pli por Esperanto

Estimataj sinjoroj kaj sinjorinoj!

Hodiaŭ mi tre ĝojas, ke mi povas ĉeesti la Solenan Inaŭguron de la 71a Universala Kongreso de Esperanto kaj saluti vin. Bonvolu permesi al mi esprimi, en la nomo de s-ro Peng Zhen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj Alta Protektanto de ĉi tiu Kongreso, kaj en mia propra nomo — kiel prezidanto de la Honora Komitato de la Kongreso — varman gratulon al la Kongreso, sinceran bondeziron kaj koran bonvenigon al la diverslandaj geamikoj ĉeestantaj la Kongreson.

Malgraŭ tio, ke mi bedaŭrinde ne lernis Esperanton, mi plene konscias pri tio, ke Esperanto mem estas granda idealo, granda strebo kaj ankaŭ granda praktiko. Ĝia centjara ekzisto kaj disvolviĝo plene montras ĝian fortan vivipovon. Tiu ĉi solena Kongreso kun pli ol 2 000 partoprenantoj el diversaj partoj de la mondo estas ĝuste inspira ekzemplo. Antaŭ nelonge, en sia 23a Ĝenerala Konferenco, Unesko aprobis rezolucion pri festado de la centjariĝo de Esperanto. Ankaŭ tio pruvas, ke pli kaj pli da homoj konsciiĝas pri la signifo de Esperanto kaj komprenas ĝian rolon; kaj la lingvo ricevas ĉiam pli vastan internacian agnoskon.

La ĉina popolo havas longan historion, tradicion en la amo al Esperanto. Tiel frue, kiel tuj post la Revolucio de 1911, nia fama demokrato kaj pedagogo Cai Yuanpei jam iniciatis, kiel tiama eduka ministro, ke Esperanto disvastiĝu tra Ĉinio. Poste, la granda pensulo kaj beletristo Lusin, la granda historiisto kaj literaturisto Ĝuo Moĵuo kaj eminenta verkisto Mao Dun estis entuziasmaj subtenantoj de Esperanto en nia lando. La forpasinta s-ro Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio — same kiel s-ro Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio — mem estis esperantisto. Pere de Esperanto, ili koniĝis al Ĉinio eminentajn verkojn de alilandaj literaturistoj. Ne nur tio, ili neniam ĉesis aktivadi por la Esperanto-movado.

En la periodo de la 30aj jaroj, la Esperantomovado de Ĉinio kunfandis sin en la batalon de la ĉina popolo por nacia liberiĝo kaj ludis en ĝi sufiĉe grandan rolon. Sekve de tio, post la fondiĝo de nia Popola Respubliko, la registaro de nia lando donis jam de komenco diversflankan apogon al Esperanto. Ĝuste en tia historia fono nia forpasinta marŝalo Chen Yi, unu el la grandaj gvidantoj de nia lando, faris en 1963 proponon pri okazigo de Universala Kongreso de Esperanto en nia lando. Kaj, jen hodiaŭ realiĝas la longvida kaj saĝa iniciato de marŝalo Chen Yi, kio tute ne hazardas. Tio estas rezulto de senĉesa klopodo de nialandaj esperantistoj dum deko da jaroj.

Sincere dirite, nia kontribuo al Esperanto estas nek tiel granda nek impona, kian lando, kun vasta

teritorio kaj multa loĝantaro kia la nia, devus fari. Ĉinio havas pli ol miliardon da loĝantoj, preskaŭ kvaronon de la tutmonda loĝantaro. Nia lando, kompreneble, devas fari pli multe da kontribuoj al la homaro kaj ankaŭ al la granda idealo de Esperanto.

La kongresa temo "Interkompreniĝo, paco, evoluo" estas ege trafa, ĉu kiel omaĝo al la Internacia Jaro de Paco, ĉu kiel atentigo pri la aktuale urĝaj problemoj de la homaro. Oni tamen ne rajtas pretervidi, ke la nuna mondo ne stabilas, kaj milita minaco regas super la popoloj. Sed, aliflanke, estas necese emfazi, ke la pacaj fortoj de la mondo vigle kreskas, kaj tio estas frukto de la luktado de diverslandaj popoloj por defendi la pacon. Tiu luktado ampleksas ankaŭ la grandan strebadon de diverslandaj esperantistoj. Ekde sia naskiĝo Esperanto ligiĝas kun pacaj idealoj. Ĉiujare la Kongreso de Esperanto tial estas solena manifestacio de la paca potencialo de la esperantistoj. Tia estas precipe la ĉi-jara, kiu estas aparte signifa kiel unu el la gravaj aktivadoj en la Internacia Jaro de Paco.

Kiel konate, nia lando praktikas pacan diplomatan politikon de sendependeco kaj memdecidado. Mi ĉiam opinias, ke la landoj — ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, sen konsidero pri socia aŭ politika sistemo — povas, eĉ devas, disvolvi rilatojn de komuna harmonio kaj amika kunlaboro surbaze de la kvin principoj de paca kunekzisto. Mi estas konvinkita, ke tia politiko kaj kredo de nia lando respondas al la Zamenhofa spirito, sekvata de ĉiuj pacamaj esperantistoj.

Por modernigi sin, nia lando aplikas la politikon de ekstera malfermiĝo. Tia malferma politiko celas ĉefe ne nur la ekonomion. En la lastaj jaroj nia lando atingis fortan disvolviĝon de la interfluo kun aliaj landoj sur la kampoj de scienco, tekniko, literaturo, arto ktp. Tiaj interŝanĝoj ankoraŭ estas plivastigataj. En la nuna mondo ĉiuj sciencoj kaj teknikoj rapide evoluas. Akcelado de tutmonda interŝanĝo en scienco kaj tekniko jam fariĝis la nepre necesa kondiĉo por la evoluo kaj progreso de la homaro. Esperanto, kiel internacia komunikilo, devas kaj povas ludi pozitivan rolon sur tiu kampo.

Universala Esperanto-Asocio decidis okazigi en Ĉinio ĉi tiun imponan Kongreson antaŭ la Centjara Jubileo de Esperanto. Tio estas ekstreme grava konfido al nia lando kaj al la ĉina Esperanto-movado. Por ne vanigi la esperon de la tutmonda esperantistaro, la Loka Kongresa Komitato faris grandan kvanton da laboro por la Kongreso. Mi elkore esperas, ke la Kongreso disvolviĝos glate kaj plene sukcesos.

Mi deziras al la diverslandaj geamikoj sanon kaj agrablan restadon en nia lando. Koran dankon!

Huang Hua

INAŬGURA PAROLADO DE D-RO TONKIN

Paco estas pli ol manko de milito

Per rezolucio de la 24a de oktobro 1985, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj solene deklaris la jaron 1986 la Internacia Jaro de la Paco. Ĝi krome atentigis, ke la popoloj devas "vivi kune en paco kaj praktiki toleremon". Estas konate, ĝi aldonis, ke "edukado, informado, scienco kaj kulturo povas kontribui al tiu celo".

Unu monaton pli poste, la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion, kiu rekonis la Jubileon de la Internacia Lingvo Esperanto en 1987. Ĝi petis la Ĝeneralan Direktoron de Unesko sekvi la laboron por Esperanto, ĝi alvokis al utiligo de Esperanto flanke de internaciaj organizaĵoj, kaj ĝi rekomendis, ke tutmonde oni enkonduku en la lernejojn studadon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto.

Sekvante la rekomendojn de Unuiĝintaj Nacioj, kaj konsciante pri la decido de Unesko, Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉi-jaran temon de sia Kongreso la temon "Interkompreniĝo, paco, evoluo."

Tiu temo tre klare implicas, ke paco estas pli ol manko de milito. Por konstrui la pacon, necesas pozitiva agado — agado, en kiu oni celu krei toleremon inter la homoj, subteni kunlaboron kaj konstrui la instrumentojn kaj instituciojn de la paco.

La kreinto de Esperanto komprenis tion. Zamenhof skribis, en nia konata himno, pri "nova sento". Ni ofte kantas tiujn vortojn, sed ĉu ni vere komprenas la signifon de tiu nova sento? Zamenhof kreis per Esperanto miraklan internacian lingvon, kiu brile funkcias — kiel ni klare vidas ĉi tie, kie ĉino kompreniĝas kun germano, brazilano kun japano, kanadano kun iranano. Temas pri kompreniĝo, kiu jam preskaŭ cent jarojn mirigas la utiligantojn de nia facila, fleksebla, esprimiva lingvo.

Poemaro por paco

Okaze de la Internacia Jaro de paco UEA invitis poetojn kaj versamantojn kontribui al tiu ĉi verko, en kiu prezentiĝas 28 aŭtoroj; kaj konataj nomoj kaj novaj talentoj.

Poemaro por paco. Pekino: Universala Esperanto-Asocio, 1986. 44p. 18cm.

Prezo: 4,50 gld. plus sendokostoj. (Rabato de unu triono por samtempe mendo de minimume 3 ekzempleroj.)



Humphrey Tonkin: Tutmonda interkompreniĝo pere de Esperanto estas fundamenta elemento de la paco.

Sed per la vortoj "nova sento" Zamenhof celis lingvon ne nur de la lango sed ankaŭ de la koro, ne nur de la korpo sed ankaŭ de la animo. La arkitektoj de la tutmonda paco, ĉu esperantistaj ĉu neesperantistaj, insistas, ke necesas ŝanĝi la pensmanieron de la homoj por krei veran pacon. Tion ni parolantaj de Esperanto komprenas. Ni jam praktikas tiun "novan senton" — senton, kiu kapablas forigi la miljarajn murojn inter la popoloj.

Pro tio, en nia kongresa temo, ni aldonis al "paco" ankaŭ la vorton "interkompreniĝo". Fakte, ni metis interkompreniĝon en unuan lokon, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de la vera paco.

Ni kongresas ĉi-jare en la plej granda lando de la mondo: unu kvarono de la monda loĝantaro estas ĉina. Ĉinio baraktas kun grandaj problemoj: problemoj de kreskanta nombro de loĝantaro, problemoj de tekniko, problemoj de organizado. Kaj iom post iom ĝi venkas tiujn problemojn. Ĝi estas vere evoluanta lando. La kongresanoj de la 71-a Universala Kongreso spertas deproksime la problemojn kaj la paradoksojn, la esperojn kaj eltrovojn de tiu ĉi lando en stato de evoluo.

La tria elemento en nia kongresa temo estas ĝuste "evoluo". Per nia temo ni sugestas, ke, same kiel paco dependas de interkompreniĝo, tiel ankaŭ evoluo dependas de ambaŭ tiuj elementoj. La ĉina estas antikva civilizo: ĝiaj kulturaj radikoj penetras profunden en la ĉina tero kaj ĝiaj kulturaj atingoj mirigas la tutan mondon multajn jarcentojn. Necesas samtempe konservi tiun kulturan tradicion kaj moderni-

gi ĝin. Tio estas ebla nur en pacaj cirkonstancoj, nur en spirito de interkompreniĝo.

Kio validas por Ĉinio validas ankaŭ por la tuta mondo: nur en paco, nur en spirito de kompreno, ni povos forigi la militon. Milito estas hodiaŭa realo en multaj landoj. Nur en reciproka respekto ni povos forigi la problemon de rifuĝintoj, nutri la malsatantojn, klerigi la neklerajn, kuraci tiujn kiuj malsanas. Nur en interkompreniĝo ni povos krei mondon, en kiu regas nova sento, nova spirito de kunlaboro, tolero kaj egala disdivido de la riĉaĵoj de nia mirakla planedo.

La Internacia Lingvo Esperanto, karaj gekolegoj, donas eblecon atingi tiun tutmondan interkompreniĝon, pri kiu aludas nia kongresa temo. Ĝi estas fundamenta elemento en la paco. Ĝi estas utila ilo en la homa kaj ekonomia evoluo, ĉar ĝi kreas reciprokajn respekton inter la popoloj kaj kulturoj, kaj ĝi ebligas senperan komunikadon en spirito de egaleco inter la homoj. En Esperanto, neniu kulturo subpremas alian kulturon, neniu homo superas alian: ni laboras sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian.

Interkompreniĝo, paco, evoluo! Je la sojlo de la Jubileo de Esperanto, ni salutas la evoluantan novan Ĉinion, ni salutas la arkitektojn de la paco tra la tuta terglobo, kaj ni salutas la parolantojn de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj faras sian kontribuon al kreo de paca mondo, al kreo de nova sento inter la popoloj.

Humphrey Tonkin

Defilo de tutmondeco de UEA

La ĉi-jaran Solenan Malfermon gvidis vicprezidanto de UEA, s-ro Yosimi Umeda, kiu reliefigis la rolon pure esperantistan de la Malfermo, kontraste kun la Inaŭguro, kiu akceptas diplomatojn kaj ekstermovadajn eminentulojn. La salono de la Ĉina Teatrejo, kiu plenplenis en la Inaŭguro, ĉi-foje arigis nur iom pli ol la duonon de la kongresanoj. Dum la lunĉopaŭzo inter la du solenaĵoj multaj kongresanoj fariĝis viktimoj de transportaj malfacilaĵoj — plago, kiu turmentis ilin tra la tuta semajno.

La tradicion salutoĉenon al la kongreso komencis la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo pere de sia prezidanto Ian Jackson, post kio sekvis la unuopaj salutoj de landaj asocioj: Sylvia M. Burkitt (Aŭstralio), Max Finkenzeller (Aŭstrio), Kate Millard (Britio), Angel Todorov (Bulgario), Zhang Qicheng (Ĉinio), Allan Jens Mogensen (Danlando), Hans Heinel (Germana DR), Claude Nourmont (Luksemburgio), Elsbeth Bormann (FR Germanio), Juan Azcuénaga Vierna (Hispanio), Ottó Haszpra (Hungario), Monireh Fahmi (Irano), Maire Mullarney (Irlando), Hallgrímur Saemundsson (Islando), Aviv Faklieru (Israelo), Maria Camilla Strozzi (Italio), Yukiko Isobe (Japanio), Boža Popović (Jugoslavio), W.G. du Temple (Kanado), Libardo Mejía (Kolombio), Ĵang Ĉung-sik (Koreio), José A. Fernández Aragón (Kubo), Joaquin Rosillo Vega Acosta (Meksikio), C. Bossong-Singer (Nederlando), Elna Matland (Norvegio), Saeed Ahmad Farani (Pakistano), Stanisław Świstak (Pollando), Märtha Andréasson (Svedio), Jean-Jacques Lavanchy (Svislando), Eden M' Bunde (Tanzanio), William R. Harmon (Usono), kaj Alberto Solarz (Venezuelo). Fine, nome de Sennacieca Asocio Tutmonda, salutis Léo Robert.

Per du muzikaj pecoj por bivo la kongresanojn denove regalis, kiel en la Inaŭguro, la juna artistino He Shufeng. Poste s-ino Ĉan Ĉu Hua, nome de la Pekina Brodaĵa Esplor-Instituto, transdonis al la prezidanto de UEA nekutiman donacon. Temis pri kvar metrojn longa kaj unu metron larĝa brodaĵo, farita honore al la Kongreso kaj simbolanta ĉion kio ligiĝas al Esperanto: la mondon (60 diversspecaj floroj), pacon (72 blankaj kolomboj), la Movadon (verda stelo), la Kongreson (brodita dediĉo al la 71a UK). Eble tiu unika donaco, kies ellaboro postulis amason da horoj kaj multan amon, bele simbolas la tutan rilaton de la ĉina esperantistaro al la fakto, ke

la Universala Kongreso — jen foje kaj finfine — venis ankaŭ al Ĉinio.

Kiam d-rino Szabó-Felső prezentis kelkajn skribajn salutojn, i.a. de Betty Salt (honora membro de UEA) kaj de japana E-societo, la parolon prenis Grégoire Maertens, por fari la kutiman prezidantan raporton al la Kongreso.

"Hodiaŭ estas la 27a de julio. Hodiaŭ komenciĝas la centa jaro de post la apero (la 26an de julio 1887) de la Unua Libro de Esperanto!" Tio estis la unuaj vortoj de Maertens, kiu en posta kvaronhoro inspire skizis la historion de Esperanto kaj precipe tiun de UEA, kiun li gvidis dum la pasintaj ses jaroj. Li prave konstatis, ke la Asocio progresis kaj transformiĝis dum liaj du prezidantaj mandatoj, kvankam la plena signifo de kelkaj el tiuj ŝanĝoj sentiĝos nur en la venontaj jaroj. Maertens diris ankaŭ jenon:

"Jam preskaŭ cent jarojn la internacia Esperantomovado kaj preskaŭ okdek jarojn UEA, kiun mi ĵus priskribis, faras grandegajn servojn al la homaro sur la kampo de la interkompreniĝo, tutmondaj amikeco kaj paco. UEA povas fari tion dank' al la idealismo, dank' al la nekontraŭstarebla konvinko de dekmiloj da esperantistoj kaj multaj pliaj miloj da simpatiantoj tra la mondo, kiuj scias, ke la solvo de la monda lingvo-problemo per la Internacia Lingvo Esperanto ne signifas nur liveron de simpla teknika rimedo, sed en si mem estas elstara kontribuo al la interhoma amikeco kaj al la monda paco."

Ĉu vi ne sukcesis havigi ĝin en Pekino?

La Libroservo de UEA rezervis por vi stokon de

Filatela tutaĵo de la 71a UK

La bela multkolora koverto havas surpresitan poŝtmarkon, kongresan emblemon kaj, dorse, klarigon en la ĉina, angla kaj Esperanto.

Prezo: 9,00 gld. por 10 ekzempleroj (minimuma mendokvanto).

Triona rabato ekde tri dekoj.

Fine de la parolado Maertens tute sprite ligis sian movadan "sorton" al la ĉina Esperanto-movado, ĉar li atentigis, ke en 1980, Stokholmo, kiam li elektiĝis prezidanto, Ĉina Esperanto-Ligo aliĝis al UEA, kaj nun, ses jarojn poste, kiam li forlasas la prezidantecon, ni kongresas en Pekino. Lian informon, ke la Komitato jam elektis d-ron Tonkin kiel novan prezidanton de la Asocio, la kongresanoj akompanis per longa aplaŭdo, kiu samtempe signifis dankan adiaŭon al unu kaj koran bonvenigon al la alia.

Novaj komitato, estraro, prezidanto

Entute 60 komitatanoj aŭ anstataŭantoj kaj 3 observantoj partoprenis la laborojn de la Komitato de UEA en Pekino. Eventualaj timoj pri kvorumo do montriĝis same eraraj kiel antaŭvidoj pri la nombro de la kongresanoj entute. La ĉeesto de tri kvaronoj de la 79-kapa Komitato tiom pli gravis, ĉar tiu ĉi antaŭjubilea jaro estas elektojaro en UEA. La Komitato mem estis novelektita — por trijara mandatperiodo — kun 58 komitatanoj A nomitaj de la Landaj kaj Fakaj Asocioj aliĝintaj al UEA, 7 komitatanoj B reprezentantaj la Individuajn Membrojn kaj 14 komitatanoj C elektitaj en Pekino fare de siaj kolegoj A kaj B.

La plej gravaj el la elektoj, kiuj atendis la Komitaton en Pekino, estis tiuj de la Prezidanto kaj de la ceteraj estraranoj. La Prezidanto elektiĝis tre rapide. Jam en sabato antaŭ la malfermo de la Kongreso la komitatanoj voĉdonis pri du kandidatoj proponitaj de la Komisiono pri Elektoj: prof. Humphrey Tonkin kaj d-ro Werner Bormann. Tonkin rikoltis 42 kaj Bormann 9 voĉojn, kaj sekve la prezida martelo revenis de s-ro Grégoire Maertens al prof. Tonkin, kiu unuafoje regis ĝin de 1974 ĝis 1980.



Pli komplika montriĝis la elekto de aliaj estraranoj. Fundaj diskutoj pri la elektenda nombro kaj pri la rolo kaj taskoj de la Estraro, kaj plurfoja transŝovo de la afero al la komisiono necesis, antaŭ ol plena nomlisto definitiviĝis. El la malnovaj membroj reelektiĝis — krom Tonkin — Grégoire Maertens (Belgio), Yosimi Umeda (Japanio), d-rino Flóra Szabó-Felső (Hungario) kaj d-rino Barbara Despinay (Francio). En la 9-membra Estraro preskaŭ duono konsistas el novaj, sed movade tre konataj

nomoj: Jean-Louis Texier (Francio), d-ro Victor Sadler (Nederlando), Diccon Masterman (Italio) kaj d-ro Ottó Haszpra (Hungario).

La novaj estraranoj frontas grandegan laboron, des pli, ĉar ĝuste ili gvidos la Asocion tra la Jubilea Jaro. Pro jama elstara laboro la Komitato distingis per honora membreco kvin membrojn de UEA: Yukiko Isobe (Japanio), Cathy Schulze (Usono), Tibor Sekelj (Jugoslavio) kaj Zhang Qicheng kaj Ye Laishi (Ĉinio). Tiel la Asocio nun havas 38 Honorajn Membrojn.

Se komplikaj transportaj kaj aliaj problemoj rabis multe da valora tempo de ĉiuj kongresanoj, ili ne povis ne sentiĝi en la komitata laboro. Necesas menciigi, ke multaj komitatanoj devis oferi partoprenon eĉ en pagitaj dumkongresaj ekskursoj. Sed eĉ tio ne sufiĉis por fari ĉion, kion la tagordo antaŭvidis. Tial ekz. la elekton de diversaj komisionoj la Komitato transdonis al la Estraro kaj pri iuj rezolucioj de dumkongresaj komisionoj ĝi voĉdonos perpoŝte post la UK.

La spezoekonto kaj bilanco de 1985 estis akceptitaj, kvankam kompreneble kun sufiĉe da grumbloj pro la negativa saldo de 93 575,74 gld. Alian bildon tamen prezentis la prognozo pri la financa rezulto de la kuranta jaro, ĉar anstataŭ negativa saldo de pli ol 36 000 gld. ĝi promesas eĉ malaperon de deficito. Al tio kontribuas i.a. bona rezulto de la pekina UK kaj malaltiĝo de salajrokostoj. Sed se temas pri tiu ĉi lasta kialo, la medalo havas alian, pli nigran flankon. Dum longa tempo la Centra Oficejo laboris kun minimuma stabo, pro kio multaj el la rutinaj taskoj tre prokrastiĝis — laste la apero de tiu ĉi numero mem.

Al la problemoj ĉirkaŭ la Centra Oficejo oni dediĉis multan atenton en la Unua Ĝenerala Kunsido, kies tasko estis trakti la Estraran Raporton pri la agado en 1985. En ĝi ankaŭ ĉeestantaj Individuaj Membroj povis interveni. La akrecon de la diskuto apenaŭ mildigis la informo, ke pro pluraj novdunĝoj la funkciado de la Centra Oficejo poiome normaligiĝos.

Ĉi-foje la Komitato decidis akcepti du kongresajn rezoluciojn; unu por esperantistoj kaj alian por la ekstera publiko (vd. la tekstojn aliloke en tiu ĉi n-ro). Interesaj detaloj en la komisionaj rezolucioj, konfirmitaj de la Komitato, estas instigo uzi la teleksilon de la CO por rekta informperado al novaĝentejoj, prepari adresaron de artistoj-esperantistoj, pliintensigi kunlaboron inter UEA kaj ILEI (oni antaŭvidas i.a. komunajn lingvajn ekzamenojn kaj pedagogiajn eldonaĵojn) kaj subteni eldonon de granda angla-Esperanta vortaro kun vasta scienca-teknika vortmaterialo. Komisiono pri Virina Agado planas daŭrigi dokumentadon pri virinoj en la Movado por eldoni libron pri la temo, kaj Komisiono

KONGRESA REZOLUCIO:

Subteni la Movadon en Ĉinio

La 71a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986 en Pekino, kun 2482 kongresanoj el 54 landoj

esprimante sian kontenton, ke la Kongreso ne nur estis la plej granda internacia aranĝo ĝis nun okazinta en Ĉinio, sed ankaŭ la plej granda Esperanto-kongreso ekster Eŭropo,

konstatante, ke en Ĉinio kreiĝas nova potenciaĵo de la nuntempa Esperanto-movado,

gratulante aparte la ĉinajn esperantistojn pro iliaj multflankaj kontribuoj al la internacia Esperanto-movado ĝenerale kaj al la Kongreso specife,

alvokas al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj subteni laŭ siaj eblaj la Movadon en Ĉina Popola Respubliko kaj en aliaj aziaj landoj, precipe per disponigo de rimedoj por praktika utiligo de la lingvo,

substrekas, kunlige kun la supra alineo, la neceson de konscia kaj sistema aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj aliaj fakaj kampoj, kaj

reapelacias al la landaj asocioj digne omaĝi la Centjaran Jubileon de Esperanto per organizado de apartaj jubileaj kunvenoj, aranĝoj, eldonaĵoj, ekspozicioj kaj aliaj agadoj.

pri Junularo, kiun surprizis la amasa nombro da junaj ĉinaj kongresanoj, apelaciis por fondo de junulara organizaĵo en Ĉinio.

Kiel en Aŭgsburgo, ankaŭ en Pekino la komitataj estis regalitaj de Oomoto per bankedo kun s-ro Deguti kiel bankedestro. En la bankedo, estis anoncita ankaŭ la estrara decido pri la plej aktiva komitato dum la pasinta jaro. Temas pri s-ro Edward Symoens el Belgio, kiu distingiĝis pro sia kontribuo al la eksteraj rilatoj kaj pedagogia kaj informa agado de UEA.

* * * *

La nova Estraro apenaŭ havis tempon por efike labori dum la UK. Tial ĝi decidis rekunveni en la CO en Roterdamo la 6an kaj 7an de septembro. En tiu kunsido povis partopreni ĉiuj estraranoj krom d-ro Haszpra, kiu liveris skribe siajn opiniojn kaj sugestojn.

La Estraro ekaplikas novstilan labormetodon, laŭ kiu ĝi funkcias en tri sekcioj: Ekstera Agado (t.e. eksteraj kontaktoj de UEA kaj de la Movado), Interna Agado (laboro interne de la Movado) kaj Financoj. Pro ofico prof. Tonkin partoprenas la laborojn de ĉiu sekcio, dum ĉiu alia estrarano agas en unu el ili. La sekcioj estas gvidataj respektive de G.

Maertens, J.-L. Texier kaj V. Sadler. Ĉiu sekcio kunsidos ankaŭ aparte kaj povas enhavi anojn el ekster la Estraro. Per la nova labormaniero oni esperas pli racie utiligi la sciojn kaj spertojn de la estraranoj kaj aliaj kompetentuloj.

Konsiderante la proksimecon de la Jubilea Jaro la Estraro taskis s-ron Simo Milojević gvidi la kunordigadon de la agado lige kun la Jubileo kaj pro tio liberigis lin de liaj rutinaj funkcioj kiel Ĝenerala Direktoro. Oni diskutis ankaŭ pri sistemigo de la labormetodoj de la Centra Oficejo. Tiu diskuto devus konduki al pli klara koncepto de prioritatoj en ĝia funkciado, kiu lastatempe estis sufiĉe perturbata. Alia diskuto, kies realigon prof. Tonkin skizis, temos pri strategiaj demandoj de UEA; nome la kreo de laborplano por 1987-90. Ĝi estos rezulto de plur-faza prilaborado, kaj al tiu ĉi temo nia revuo certe ankoraŭ ofte revenos.

Osmo Buller

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

Ye: IKU servas por spirita interproksimiĝo

Inaŭgurante la 39an sesion de la Internacia Kongresa Universitato en Pekino ties rektoro, la renoma verkisto s-ro Ye Junjian, traktis la temon "Scioj por paco kaj bono de popoloj".


La hodiaŭa homa civilizacio ebligas pli rapidan kaj facilan komunikadon inter Ĉinio kaj Eŭropo ol dum la mezepoko. Laŭ Ye, la kolektiĝo de pli ol du mil esperantistoj en la 71a Universala Kongreso de Pekino ŝajnas kiel miraklo por ĉinoj. Fakte, ankaŭ prezentado de esperantlingvaj prelegoj fare de diverslandaj sciencistoj kaj kleruloj en IKU estas por ili eksterordinara. La idealo, ke la homaro estas "granda familio", kaj ke ĝi vivu en paco kaj harmonio, havas tamen radikon en la antikva tempo de Ĉinio, atentigis Ye.

Krom la ĝenerala karakterizaĵo de IKU, kiel tiu de aliaj universitatoj, ĉi tiu sesio de IKU havas ankaŭ sian propran karakterizaĵon, kiu estas la aplikado de Esperanto kiel komunikilo. "Ĉar la lingvo estis kreita kun la ideo de mondpaco kaj amikeco, la uzado de la lingvo mem estas eksplicita manifestacio de la deziro de paco kaj amikeco de homaro", li diris. Decas, ke ankaŭ aliaj universitatoj adoptu tian orientiĝon en sia instruado.

La disvolviĝo de transportiloj kaj amaskomunikiloj proksimigas la rilatojn inter popoloj. Oni povas diri, ke la idealo de ĉinaj prauloj, ke "homaro fariĝu granda familio", estas geografie kaj teknike realigi-

ta. Sed la konceptoj kaj pensoj de la homoj diferencas. IKU servas por spirita proksimiĝo inter diverslandanoj, diris Ye, kiu fine konstatis: "La inaŭgurado de IKU en la ĉefurbo de la antikva kaj samtempe nova Ĉinio, kiu havas longan tradicion de kulturaj interŝanĝoj kun aliaj landoj, entenas specialan simbolan signifon por la nuna epoko, kiam la mondpopolo deziras vivi en paco, en harmonio, en riĉa kultura medio".

Post la inaŭgura parolado de rektoro Ye, prof. Chen Yuan (Ĉinio) komencis la serion de prelegoj. Li traktis la temon "Popoloj, lingvo kaj kulturo". Aliaj prelegintoj estis Sin'itirô Kawamura (Japanio) pri "La reakcio de Maillard inter amino- kaj karbonilgrupoj en manĝaĵoj kaj aliaj", Io Chou (Ĉinio) pri "Papilioj venas", J.M. Mabesoone (Brazilo) pri "Resuma historio de la tero", E. James Lieberman (Usono) pri "Psikoterapio: evoluo de post Sigmund



Ye Junjian (ĉi-supre), renoma ĉina verkisto, rolis kiel rektoro de la 39a sesio de IKU. Prof. Chen Yuan (maldekstre) verve traktis sian prelegtemon.

Freud", Božidar Popović (Jugoslavio) pri "Popaŝa astronomia solvado de la glaciepoka enigmo", Leszek Kordylewski (Pollando) pri "Interno de la ĉela membrano", Daniela Deneva (Bulgario) pri "Interna strukturo de la tero laŭ sismologiaj donitaĵoj", Li Shijun (Ĉinio) pri "Enkonduko al studo pri ĉinaj popolkantoj" kaj Victor Sadler (Nederlando) pri "Distribuita lingvo-tradukado: nuna stato kaj potencialoj". Kiel ĉiam, ankaŭ ĉi-foje IKU estis multnombre vizitata de kongresanoj, kaj la du salonoj Zamenhof kaj Verda Majo montriĝis oportunaj prelegejoj, sed ja la kongresejo, la Scienca Halo de Pekino, kutime servas ĝuste kiel ejo por similaj aranĝoj.

Kopioj de la prelegotekstoj estas aĉetablaj ĉe la Libroservo de UEA.

LA TAGO DE LA PACO

Arte kaj aferece pri la kongresa temo

Iniciatita en Aŭgsburgo kaj aprobita en unu el la komitatataj rezolucioj, la Tago de la Paco komencas fariĝi konstanta parto de la kongresa programo kun konformaj pritemaj kaj artaj aranĝoj.

En Pekino la Tago de la Paco okazis la 1-an de aŭgusto. Ĝi konsistis el tri partoj, nome, pritrakto de la kongresa temo en formo de raportoj kaj intervenoj matene, la Dua Ĝenerala Kunsido de UEA per aldonaj opiniesprimoj pri la temo posttagmeze, kaj vespere packoncerto en formo de internacia arta prezentado.

Pritrakto de la kongresa temo

Proksimume 300 personoj kolektiĝis en la trihora kunsido dediĉita al la kongresa temo. S-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, kiel ĉefprizorganto de la Tago koncize enkondukis la temon "Interkompreniĝo, paco, evoluo". Poste, s-ro Claude Piron el Svislando transprenis la prezidon de la kunveno.

Sinsekve esprimis relative detale laŭ diversaj starpunktoj kaj profesioj, fakoj kaj porpacaj aktivaĵoj, sian opinion pri la temo ges-roj Kawanisi Teturo (Japanio), Vasja Cvetkova (Bulgario), Mārta Andréasson (Svedio), Ian Jackson (Britio), Tabuti Yasuo (Japanio) kaj Claude Piron, post kio kelkfraze aŭ eĉ poeme intervenis ankaŭ ges-roj Mei Luo (Ĉinio), Zhang Shu-hua (Ĉinio), Peter Gardner (Britio), Leonor Calvo y Feijoo (Kolombio) kaj Maria Murphy (Usono).

Preskaŭ ĉiuj parolantoj emfazis la gravecon de paco, la angoron kaŭzatan de la risko de nuklea milito kaj la altan koston, kiun sorbas armado, dum multaj sociaj bezonoj ne ricevas la necesajn monrimedojn. Tamen la temo "evoluo" estis apenaŭ tuŝita.

Kiam ne plu proponis sin personoj dezirantaj paroli, la ĉeestantoj petis s-ron Piron pritrakti kelkajn punktojn, kiujn li ne povis aliri pro manko de tempo en sia antaŭa raporto.

Dua Ĝenerala Kunsido

Posttagmeze en la Salono Zamenhof kunsidis ĉirkaŭ 200 personoj por traktado de la kongresa temo sub la prezido de s-ro Yosimi Umeda, kiun asistis s-ino Michela Lipari el Italio.

Preskaŭ ĉiuj kunsidantoj jam aŭskultis la raportojn pri la kongresa temo en la matena sesio, kaj tial sin proponis deko da personoj por elpaŝi kun siaj opinioj pri la temo. Du el ili prilumis la preskaŭ



Dancistino Hanayagi Izuho portis al la pekina scenejo la fluidecon de japanaj danco kaj kostumo.

netuŝitan parton "evoluo", kaj ceteraj homoj atentigis pri la graveco de la porpacaj laboroj flanke de la esperantistoj individue kaj kolektive, kaj ankaŭ psikologian avantaĝon uzi la neŭtralan lingvon Esperanto por pritrakti delikatajn problemojn rilatan-tajn al aliaj landoj.

Aŭdiĝis aliflanke la piendo, ke pritraktadon de la kongresa temo havis nur la Tago de Paco en Pekino, krom kelkaj porpacaj fakaj kunsidoj, tiel ke la grava temo estis kvazaŭ metita en unu tirkeston. La kongresa temo en ĉiu UK devas esti diskutata pli amplekse tra la tuta semajno en diversaj okazoj.

La prezidanto de la kunsido asertis en sia konkluda parolo, ke jam klaras la difino pri esperantista starpunkto koncerne la porpacan strebadon surbaze de pozitiva neŭtraleco kaj solidareco. Li aldonis, ke ni ne plu naive kredis, ke Esperanto solvos problemojn pri paco, sed ni ja konstata la rolon de esperantistoj, kiuj frontas en ĉiuj partoj de la tergloba aktualajn demandojn ĉiutage. Fine, li pledis: por ke la Tago de la Paco estu vere celtrafa en ĉiu UK, ne sufiĉas nomi unu tagon tia.

Packoncerto

La kongresanaro plenigis la 2000-ŝegan Ĉinan Teatrejon, vendrede vespere, por pace distriĝi per diversaj prezentadoj de profesiaj artistoj. Post enkondukaj vortoj de s-ro Yosima Umeda, kiu denove substrekis la signifon de la Tago de la Paco, s-ino Xue Meixian, esperantlingva anoncistino de Radio Pekino, laŭvice prezentis la artistojn de la vespero.

En la unua parto prezentis kantojn s-ino Bian Xiaozhen, s-ro Ge Xiao Cheng kaj s-ino Qiu Zimin, ĉiuj el Ĉinio. S-ro Jeraĥimiel Giladi el Israelo deklamis sian felietonon kaj s-ro Hukuzawa Moro, japa-

na konata popularkantisto, kantis kun propra pianakompanado *Kanton de l' Kosmo*, kiun poste ankaŭ la publiko kune kantis laŭ la distribuita kantoteksto.

En la dua parto la publikon okulfrapis kaj ravis la eleganta dancado de la japana dancistino f-ino Hanayagi Izuho, kiu kun pompa kostumo surscenigis legendan prezentadon. Aliaj ĉinaj gekantistoj laŭ variaj manieroj montris la talenton de belkantado; s-ino Lin Fang kun modernaj kaj popolaj kantoj, dueto de s-ino Fu Peidi kaj s-ro Piao Zhun Shan kun harmoniaj melodioj, kaj s-ro Zhang Jun kiel pekina operisto kun surpriza prezento de pekin-opera ario en Esperanto; kaj la finalon kulminigis la bulgara koruso Patrolanda Kanto kun 55 membroj per ses balkanaj kantoj.

Yosimi Umeda

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1986

Rezultoj

Konkursis entute 146 verkoj (pacpremio 14, poezio 44, prozo 25, teatraĵo 5, esejo 7, infanlibro 3, kanto 14, fotografio 34) de 82 konkursantoj, el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn:

PREMIO PRO PACOTEMA VERKO: Stefan MacGill (Hungario) pro la poemo *Reveno al paco*.

POEZIO: Unua premio: Albert Goodheir (Skotlando) pro *Adoro*; Dua premio: Albert Goodheir pro *Enlumigo*; Tria premio: Karolina Gilmore (Anglio) pro *La poeto*.

PROZO: Unua premio: K. T. Jankovic (Jugoslavio) pro *Nokturno por blankulo*; Dua premio: F. Ksavero Moleono (Hispanio) pro *Hura!*; Tria premio: egale al F. Ksavero Moleono pro *Malantaŭ la pordo*, al Spomenka Ŝtimec (Jugoslavio) pro *Pruntitaj veroj* kaj al Gunnar Gällmo (Svedio) pro *Lingva demando*.

TEATRAĴO: Unua premio: Karolina Gilmore pro *La verda tendo*; Dua premio: Karolina Gilmore pro *Filozofio kaj realo*; Tria premio: J.M. Derzelle (Belgio) pro *Se ĉiuj homaranoj...*

ESEO (Premio Luigi Minnaja): Albert Goodheir pro *Esperanto en nova framo*.

INFANLIBRO DE LA JARO: *Joĵo* de Elsa Otto, eldonita de Internacia Esperanto-Instituto.

KANTO (Premio An-okin pri Kanto): Olena Kopistjanska (*Sovetio*) pro *Muziko*.

FOTOGRAFIO: unuan kaj duan premiojn oni ne aljuĝis; Tria premio: Miyosi Tanaka (Japanio) pro la triptiko *Paco de Hirosima*; Laŭda mencio: István Balázs (Rumanio) pro nigrablanka foto *Varsovio*.

Triumfo de artismo

Unu vorto priskribas la karakteron de la Nacia Vespero kaj la Folkloro Vespero: profesieco. Simple dirite, ambaŭ eventoj estis konkursodefio ne nur al ĉiu estonta Universala Kongreso sed ankaŭ al kiu ajn profesia trupo.

La Nacia Vespero brile karakterizis la esencon de la vorto 'nacia', ĉar ĝiaj akrobatoj, dancistoj kaj muzikistoj estis tute ĉinecaj. El kompleta repertuaro de egale elstaraj prezentaĵoj estas tre malfacile, eĉ mal-inde esprimi preferon; ni menciuj tamen la *Galopa Ĉevalo* de la orkestro de la Centra Kantanca Ensemblo. Kontraste kun la delikata sinretenemo de la ĉina temperamento, elstaris la atakema verovo kombinita kun la teknika perfekteco de la orkestro kaj ties solisto, kies arĉomastrado konvinkis nin en la fino, ke lia dukorda muzikilo estas ĉevalo henanta sur la scenejo.

La Folkloro Vespero estis same surpriza, ĉar ĝi konsistis nur el la ĉina opero *Sur la Silka Vojo*, kiun okcidentaj spektantoj eble konsideris esti pli baledo ol opero. Ĉefe pere de dancado kaj senparola aktorado kun kontinua akompana muziko aŭ klakado la antikva rakonto malvolviĝis en deko da diversaj scenoj bunte kaj abunde ilustritaj de la pavecaj kostumoj kaj la fajne nuancitaj scenobildoj.

Ĉiuj spektaklistoj, ĉu muzikaj, dancaj, akrobataj aŭ aliaj, estis rimarkeblaj pro la artismo, per kiu ili sin prezentis. Neniu ĉina artisto faris spontanee, ne elpensitan movon eĉ por fari kvin paŝojn de la kulisoj al la centro de la scenejo, kio emfazis la puran profesiecon de ĉi tiuj kongresaj spektakloj.

Diccon Masterman

KONCERTO DE J. RABU

Brave, Joëlle!

Frontante malfacilaĵojn organizi la kutiman kongresan koncerton, kiu treniĝas jam tra multaj jaroj kaj kongresoj, plej ofte sub la nomo Internacia Arta Vespero, kaj prezentas kutime la samajn amatorojn kaj artistojn kun la sama aŭ simila repertuaro, la pekina LKK faris kuraĝan kaj trafan paŝon: ĝi invitis la kanadan kantistinon Joëlle Rabu tutvespere koncerti por la 71a UK. Ŝi kaj ŝiaj muzikistoj havis malpli ol du monatojn por pretiĝi, ne tiom muzike kiom lingve. Ili venis la tutan vojon de Vankuvero ĝis Pe-

kino nur por tiu unu koncerto, sen ajna honorario, kontraŭ kovro de modestaj restadkostoj kaj flugo, kion afable subtenis ankaŭ la Eduka Fondaĵo Carson.

Por la plimulto de la kongresanoj la koncerto de Joëlle estis granda travivaĵo kaj same tia sukceso. Brila sonora voĉo, suverena rego ne nur de la muzika sed ankaŭ de la aktora sceneja arto, majstra kunmeto kaj gvido de la programo — ĉio kun sentema akompano de muzikista kvaropo. Eble la plej sukcesa kanto de la koncerto estis "La vivo rozas" de Edith Piaff, en bela traduko de Claude Piron (ĝene-



rale Rabu inklinas al la repertuaro de Piaff, kaj havas voĉon kiu pravigas tion). Joëlle dediĉis tiun sian kanton al Veselin Damjanov (1925-1986), kiu sendube estis la plej bona kaj la plej kompetenta kantisto, kiun la Movado konis. "Omaĝo al V. Damjanov" estas ankaŭ la titolo de gramofondisko, kiun Rabu lanĉis en Pekino.

Eventuala malforto de la koncerto estis la fakto, ke nur duonon de ĝia repertuaro konsistigis kantoj en Esperanto, dum la aliaj estis en la franca kaj angla. Joëlle ŝajne konsciis pri la troa sentemo de la esperantistaro tiurilate kaj ŝi ĉarme plektis en la programon du grandegajn panelojn sur kiuj la publiko povis legi la nacilingvan tekston en fonetika Esperanta transskribo. Por kelkiuj ankaŭ tio ne sufiĉis kaj ili kritikis la okazigon de tia koncerto. Absurdaĵo! Estas tempo, demandi sin, ĉu oni iras al koncerto pro muziko aŭ pro nia "kara lingvo"? Verŝajne ja pro ambaŭ, sed devus esti unuavice pro muziko. Ni paciencu iom kun Joëlle Rabu. Ŝi koncertos por ni tutvespere en Esperanto eble jam venontjare en Varsovio. Sed oni povas jam nun diri, ke ŝia apero sur la movada scenejo estas tuta grandioza evento kaj ĝuoplena arta regalo. Brave, Joëlle!

sm

Vida Jerman kiel Verda Majo

Estas ankoraŭ malofta okazo, ke la kongresan teatron vesperon okupas originala Esperanta teksto. Privat faris tion en 1913 en Berno per *Ginevra*, Spomenka Ŝtimec nun en Pekino per *Virino, kiu flustris en uragano*. Pri *Ginevra* oni skribis: "Pli bone ol pri la drama, Privat sukcesis pri la lirika parto de sia verko." Simile eblus verdikti pri la verko de Ŝtimec prezentita en la 71a UK. Aŭ ni eble eraras, ĉar estis tiu damna salonego kun preskaŭ 2 000 homoj, kiu trudiĝis kiel sola teknika eblo por ludi monodramon, ideale konceptitan por spektejo de dekona grandeco. Origine la reĝisoro R. Marčić planis pli da sonaj kaj lumaj efektoj, sed necesis cedi, ĉar la salonego ne toleris ilin.

Eble ne gravas, ke Ŝtimec tro lirike pentris la japanan esperantistinon/revoluciulinon Hasegawa Teru (pseŭdomimo: Verda Majo) en la uragano de la japana invado de Ĉinio. Estis tie Vida Jerman, aktorino tenera kaj leona samtempe, plene posedanta ne nur la teatron arton sed ankaŭ la lingvon en kiu ŝi rolis. Ŝi faris tute heroan investon de siaj talentoj kaj fortoj, sed tio ne sufiĉis en la lukto kun la vasteco de la salono. Estas maljuste meti artiston en tian



situacion, kian Vida Jerman malĝuis en Pekino. Por ke tiu ŝia investo ne iĝu simpla fordubiĉo de talento kaj tempo, necesus inviti ŝin reprize premieri pri Verda Majo en Varsovio, sub adekvataj teatraj kondiĉoj. Meritas tion kaj Vida Jerman kaj Spomenka Ŝtimec.

9-a ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

Kuraĝa alfronto de tikla problemaro

En siaj enkondukaj vortoj d-ro Detlev Blanke klarigis la elekton de la temo "Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto": tro ofte oni konsideras nur la leksikan — klare eŭropecan — aspekton de Esperanto; la kongresloko invitas al pli vasta rigardo.

La novan etapon de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo CED ilustris prof. Humphrey Tonkin: ĝian duflankan aktivecon montras i.a. la decembraj konferencoj en Novjorko (nun kunlabore kun la traduka fako de UN mem), prizorgante kaj la "ekologion" de la internacia lingvo kaj la eksterajn rilatojn. CED mem plue eldonas la revuon *Lingvaj problemoj kaj lingvoplanado*, kies prestiĝo multe kreskis internacie.

D-ro Dan Maxwell (Usono) montris, ke lingva kapablo havas mezan pozicion inter la "ĝeneralaj homaj kapabloj" (kiel vido, aŭdo, sonformado, piedirado...) kaj la lernitaj (naĝado, legado...). Tuŝinte la — nepruvitan — opinion, ke ekzistas homoj nekapablaj lerni fremdan lingvon, li demandis: "Ĉu la lernita kapablo uzi la gepatran lingvon helpas al neeŭropanoj pri la lernado de Esperanto malpli ol tiom, kiom ĝi helpas al eŭropanoj?" Responde li antaŭmetis tri tezojn: 1) Lingvaj ecoj kun forta rilato al ĝeneralaj homaj kapabloj helpas samgrade al ĉiuj lernantoj, sendepende de la gepatra lingvo (i.a. 13 ĝenerale uzataj sonoj). 2) Lingvaj ecoj de Esperanto sen tia rilato helpas nur, se ili kongruas kun la lernitaj kapabloj de la lernantoj. 3) La manko en Esperanto de specifa superflua eco apartenanta al ies gepatra lingvo ne malfaciligas la lernadon de Esperanto por li aŭ ŝi.

En la sekva diskuto klarigis, ke ne ĉiuj aziaj lingvoj, sed ĉefe la sudorientaj malhavas la aluditan "redundancon" (formabundon), tipe koncizaj en la esprimado. Iu oponis, ke ĝuste eŭropaj lernantoj penas balasti Esperanton per sialingvaj distingoj, kio

malfaciligas ilian lernadon. Prof. Julius Balbin kaj poste Ilona Koutny resendis al la detala pritrakto de la temo en *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, en kiu d-ro John Wells sekvis la klasifikon en lingvo-grupoj de Greenberg. S-ino Koutny komparis la morfologion kaj kunmetadon en Esperanto kaj la hungara. La eŭropeco de Esperanto evidente varias laŭ la lingvaj kampoj: vortradikoj estas ĝenerale hind-eŭropaj, ĉefe latinidaj laŭ la formo, sed ofte rusaj laŭ la signifo, kiel pruvis prof. Szerdahelyi. Tamen, laŭ la strukturelementoj Esperanto similas kaj la lingvojn vort-izolajn (kiel la ĉina), kaj la aglutinajn (kiel la hungara).

Klaran bildon pri malfacilaĵoj de Esperanto por japanoj prezentis s-ro Kurisu Kei, kiu mem post la angla kaj franca preskaŭ lude lernis nian lingvon kiel 20-jarulo. Malmultaj japanoj praktikas Esperanton, ofte aŭdiĝas la plendo pri troa eŭropeco. En 1923 Japana Esperanto-Kongreso eĉ kondamnis la neologismemon de *Literatura Mondo*, kio elvokis fortan proteston de Kalocsay, kaj Waringhien atentigis, ke ĝuste en la japanan invadis amasoj da ĉinaj kaj uson-anglaj vortoj: nuna japana poŝvortaro enhavas eĉ 10 000 fremdvortojn. Tamen, la plej uzataj

Aŭdu la voĉon, kiu ravis en Pekino!

JOËLLE RABU:

Omaĝo al Veselin Damjanov

Stereofona disko, 45 t/m, kun la kantoj "La vivo rozas" kaj "La valso patrina". Vancouver, B.C.: Goldrush Records GAS 111, 1986. Prezo: 6,00 gld. plus sendokostoj. (Sesona rabato ekde 3 ekzempleroj).

ortoj — s-ro Kurisu Kei donis dekojn da ekzemploj — neniel similas inter la japana kaj Esperanto. Simile, kiel Zamenhof ne sukcesis memorteni la signifon de sia projekto "a, ab, ac" (laŭ la letero pri la deveno de Esperanto, al Borovko), la Esperantaj elementoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj memoreblaj por japanoj. Aldone la frazkonstruo ofte estas inversa: "Ankaŭ la patro de mia amiko estas laboristo" en japana sinsekvo estus "mi-de amiko-de patro ankaŭ laboristo estas".

En sprita, diskutveka parolado, "Lingvikaj vortoj en Esperanto por japanoj", s-ino Akiko Woessink-Nagata kritikis la dusencecon de multaj lingvistikaj terminoj. "Sin-takson", "sem-anton", "sin-kronan", "graf-isman" k.a. ŝi kungluis al ŝvarceca ĵonglaĵo. Poste, laŭ la ĉina kaj japana modelo, ŝi pledis por travideblaj terminoj, "akademi-(fak)-vortoj". Tio havas lingvo-psikologian efikon: stimuli japanajn esperantologojn verki ne nur japane. Pli ol la 15-a regulo de la Fundamento, la 11-a meritas atenton kun akcento sur "gluismo" kaj "erismo" en la vortfarado.

"La Lingvo Internacia el ekstereŭropa vidpunkto" en la prezento de d-ro Amri Wandel traktis ĉefe la sociologian flankon. Ekster la movado en Eŭropo, kie ja rolas la lingva diverseco, en magia cirklo kunĉeniĝas manko de informoj kaj rimedoj, izoligo, malalta lingva nivelo, ne-eblo ĝuste por junuloj partopreni en internaciaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. Pliboniĝon promesas la kresko en tutmondaj kontaktoj kaj plioftiĝo de kongresoj ekster Eŭropo.

Cetere aŭdiĝis rimarkoj, ke necesas studi la lingvon ne nur kompare, sed ĉefe surbaze de la propra materialo (prof. Régulo Perez); ke la ortografio bezonas universaligon (kio ne renkontis aprobon) kaj ke la konferenco ne solvis la ĉefan problemon, nome kiel fari la lingvon kaj la sciencan utila por la ordinarnaj homoj. Ĝenerale tamen ankaŭ ĉi tiu pekina esperantologia konferenco meritas altajn poentojn en jam 10-jara tradicio.

Rob Moerbeek

Por la maŝintraduka projekto
("Distribuita Lingvo-Tradukado")

la komputil-programa kompanio BSO serĉas

KUNLABORANT(IN)OJN FRANCLINGVAJN
por laboroj sintaksaj kaj/aŭ vortaraj.

La projekto DLT, lanĉita en 1985, celas efektiviĝi duonaŭtomatan, altkvalitan permaŝinan tradukon el la angla en la francan pere de Esperanto. Internacia teamo el 15 komputilistoj kaj lingvistoj jam konstruas la sistemon ĉe BSO en Utrecht, Nederlando, en kunlaboro kun pluraj universitatoj.

La taskoj, por kiuj estas nun bezonataj pliaj kunlaborantoj, postulas **denaskan scion de la franca lingvo** kaj tre bonan scion de Esperanto, kaj pasive kaj aktive. Por la sintaksa laboro necesas sperto sur la kampo de kompara lingvistiko (kontrasta sintakso). Por la vortaraj laboroj, sperteco pri tradukado, pri vortaroj, aŭ pri komputiloj estas avantaĝo.

Ekzistas eblecoj kaj por laboro ĉe BSO en Nederlando kaj por hejma laboro (per korespondo aŭ per komputila ligo, se oni disponas pri mikrokomputilo). Kontraktoj povas esti por pli aŭ malpli longa daŭro.

Kandidatoj anoncu sin kun kompletaj informoj pri siaj spertoj, kvalifikoj ktp. p/a BSO/Research, Postbus 8348, NL-3503 RH Utrecht, Nederlando; tel. (.31 aŭ 0) 30 911 911, al d-ro Schubert aŭ d-ro Sadler, kiuj ankaŭ povas doni pli precizan priskribon de la taskoj.

DLT

Esperanto — ne same facila por ĉiuj...

Por la kvina fojo UEA aranĝis la Tagon de la Lernejo en la kadro de la Pekina UK, mardon, la 29an de julio. Pro neeblo mem partopreni ĝin s-ro Baldur Ragnarsson, estrarano pri edukado ĉe UEA, petis s-ron Yosimi Umeda, vicprezidanton de UEA, transpreni la kunordigan laboron de la Tago, kiu konsistis el du partoj: la 9a Esperantologia Konferenco en la mateno (v.d. aliloke en tiu ĉi numero) kaj kolokvo pri la ĉeftemo de la Lerneja Tago, en la posttagmezo.

Kiaj estas la apartaj problemoj en la instruado de Esperanto en la Oriento? Posttagmeze tiu ĉeftemo estis pritraktita de 6 raportantoj laŭ diversaj spertoj kaj vidpunktoj, sub la gvidado de s-ro Li Shijun' (Ĉinio). La mesaĝo de s-ro Ragnarsson estis laŭtleĝita de s-ro Umeda.

F-ino Gotoo Sumiko (Japanio) parolis pri "Apartaj problemoj en la instruado de Esperanto al la japanaj elementlernejoj — surbaze de 12-jara praktika gvidado de lernejoj Esperanto-klubo" kun dekoj da diapozitivaj, dum ŝia samlandano s-ro Satoo Syōiti raportis pri "Lingvo-instruado kaj problemoj de la enkonduko de Esperanto en la japanaj liceoj". La referaĵon de s-ro Bak Giŭan (Korea Respubliko) pri "Diversaj problemoj spertataj dum la instruado de Esperanto kiel oficiala lernobjekto en la Universitato Dankuk en Seulo" laŭtleĝis d-ro So Gilsu, kiu mem traktis la temon "Praktikaj problemoj de Esperanto-instruado laŭ la spertoj en universitataj kluboj kaj urbanaj kursoj en Korea Respubliko". El la kongreslando estis du kontribuantoj: s-ro Wei Yuanshu parolis pri "Instruado de Esperanto al altgradaj (universitataj kaj kolegiaj) studentoj en Ĉinio en komparo kun la instruado de aliaj lingvoj" kaj s-ro Gu Jianhua pri "Ĝeneralaj kaj specifaj problemoj de Esperanto-instruado al ĉinoj". Aldone, s-ro Kinugasa Hiroshi (Japanio) koncize demonstris sian rapidkurson "Panorama metodo — Enkonduka kurso de Esperanto en tri horoj".

Dum la 9a Esperantologia Konferenco ĉefe prezentis teoriajn kaj metodikajn flankojn de la temo, en la posttagmeza kolokvo ĉiuj raportantoj prilumis la praktikajn problemojn en la instruado de Esperanto al la orientazianoj. Resume, oni pli bone ekkomprenas la diversflankan malfacilecon de Esperanto por lernantoj ekster Eŭropo. Konstateblas seriozaj kaj aktualaj malfacilaĵoj de Esperanto ne nur en ĝia gramatika, struktura diferenco por eksterhin-

deŭropaj lingvogrupoj, sed ankaŭ en prononcado kaj praktika uzeblo ktp. por neeŭropaj esperantistoj.

Estis vere bona okazo, ke en la Tago de la Lernejo en Pekino instruistoj el Eŭropo povis lerni multon de samfakuloj el la orientaj landoj, kiuj klopodas venki tiujn malfacilojn de Esperanto. Leviĝis sugestoj, ke oni kompilu ian mondan mapon pri komunaj elementoj de malfacilaĵoj kaj oftaj erarigaĵoj laŭ diversaj lingvogrupoj, kies anoj ellernis Esperanton. Samtempe ankaŭ la grava rolo de ILEI estis priatentata.

Yosimi Umeda

Kelklinie pri. . .

Kongresejo: La Scienca Halo de Pekino, kvankam ideale situanta rilate la plej uzitan Hotelon Amikeco, malkonvenis por tiel granda kongreso. Tial akceptejo kaj ĝiĉetoj apenaŭ ekzistis, por eĉ ne paroli pri tio, ke ili funkciis. Aliflanke, la Ĉina Teatro, kie okazis preskaŭ ĉiuj solenaĵoj kaj vesperaj aranĝoj, estis bonega, bele ornamita ekstere kaj interne, modele funkcia.



Akceptoj: Aldone al la tradiciaj (diplomatoj, Societo Zamenhof), okazis tuta aro da aliaj akceptoj kaj bankedoj: Huang Hua aranĝis akcepton kaj bankedon por kelkaj centoj da kongresanoj en la parlamentejo, Radio Pekino gastigis siajn aŭskultantojn, Guoji Shudian (librokomerca kompanio) aranĝis solenan vespermanĝon por siaj klientoj, okazis ankaŭ bankedoj de vicurbestro de Pekino kaj de Oomoto (por la Komitato de UEA), prof. Chen Yuan faris bankedan akcepton por la Estraro, Ĉina Internacia Turisma Servo bankedigis ĉiujn (ĉ. 800) siajn klientojn... ktp.

Bankedo kaj Balo: Ĉirkaŭ 900 personoj partoprenis la oficialan Bankedon. Bele estis, ke triono el ili estis ĉinoj. La Bankedo estis bona, sed la Balo, kiu sekvis en la samaj ejoj de la Internacia Klubo de Pekino, montriĝis suferi pro manko de unu granda ejo, tiel ke la kongresanoj disiĝis tra pluraj ejoj en du etaĝoj.

Kuriero: Al la nova etapo estis ĝia titolo. Grafike kaj enhave ĝi certe estis la plej bona kongresa kuriero ĝis nun. La redakcio de *El popola Ĉinio* meritas ĉiujn gratulojn pro la prizorgo de tiu laboro.

Fotoservo: Ankaŭ ĝi funkciis bonege kaj tute profesinivele. Denove temis pri laboro de la redakcio de *El popola Ĉinio*.

Libroservo: Kvankam ĝi situis en la 4a etaĝo de la kongresejo, kio ja estis malavantaĝo, la Kongresa Libroservo (en prizorgo de Guoji Shudian) estis tre taŭge aranĝita kaj apartenis al la plej bonaj kongresaj fakoj. La sumo de la vendoj estis ĉ. 25 000 gulde-



noj, sed tio ne prezentas ĝuste la grandecon de la komerco, ĉar UEA rezignis pri ĉia gajno kaj liveris ĉiujn ne-ĉinajn titolojn kun pleja ebla rabato.

Gazetara Servo: Ĝi funkciis tre bone kaj la eĥo de la Kongreso en la ĉinaj gazetaraj, radio kaj televido estis grandega. Al la gazetara konferenco venis 102 ĵurnalistoj.

Diservo: Iom lastmomente organizita ĝi tamen okazis por preskaŭ 200 gekongresanoj, kiuj sukcesis venki transportajn problemojn.

Filatelito: Ĉinio eldonis specialan koverton kun surprisita poŝtmarko omaĝe al la 71a UK. Tiu "filatela tutaĵo" estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA.


Kursoj: La ĉina eksprese, konversaciaj rondoj, progresiga kurso, Cseh-kurso, Cseh-seminario — tiuj aranĝoj altiris multajn kongresanojn. Ĉinaj partoprenantoj volis kapti la unikan okazon altigi sian parolkapablon de Esperanto.

Fakaj kunvenoj: Ili abundis preskaŭ kiel en la aliaj Kongresoj. Kunvenis: terminologoj, poŝtistoj, veteranoj, radio-amatoroj, go-ludantoj, fervojistoj, medicinistoj, verkistoj, akademianoj, Oomoto, Monda Turismo, kristanoj, bahaanoj, filologoj,

sciencistoj, blinduloj, filozofoj, skoltoj, aŭtomobilistoj, komercistoj, foto-amatoroj... Apartan kaj tre sukcesan aranĝon havis ankaŭ la legantoj de *El popola Ĉinio*.

Tuttaga ekskurso: Preskaŭ ĉiuj kongresanoj iris al la Granda Muro. Transporti en longega karavano de pluraj dekoj da aŭtobusoj pli ol 2 000 homojn al distanco de 80 km, tio postulis apartan organizan streĉon. La ĉinoj tamen faris tion mirinde, sen ajna halto, kun trafikpolico fronte kaj fine de la karavano, kun helikoptero super ĝi. Sed, samtempe ĉe la Granda Muro troviĝis ankaŭ miloj da aliaj turistoj kaj kreiĝis iom tro da tumulto homa por plene ĝui la mirindan historian monumenton.

Aliaj ekskursoj: Abundo da antaŭkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj enestis la programon, tiel ke centoj da kongresanoj eluzis la okazon konatiĝi kun Ĉinio. Ĉiuj tiuj ekskursoj estis bone organizitaj, kvankam kelkaj kongresanoj ne sciis mezuri siajn fortojn kaj aliĝis al ekskursoj super sia fizika kapablo. Aliflanke, multaj kongresanoj maltrafis tiun aŭ alian duontagan ekskurson en Pekino mem, ĉar la transportaj servoj plurrilate estis malkontentigaj.





Amaso da ĉinaj honoraj gastoj sur la podio komence de la Kongreso esprimis bondezirojn por sukcesa kongresa semajno. Dum la Solena Fermo eblis konstati, ke tiuj bondeziroj plene realiĝis.

SOLENA FERMO

La vorto *laboro* estas naŭlitera — *kunlaboro*

Ni estas denove en la Ĉina Teatro, tiu bela kaj taŭga el la du ĉefaj konstruaĵoj, kiujn uzis la 71a UK. Sur la podio jam estas la nova Estraro de UEA. La Solena Fermo okazas sub la lerta prezida gvido de d-ro Humphrey Tonkin. Li tuj en la komenco donas la parolon al du salutantoj de landaj asocioj, kiuj maltrafis fari tion dum la malferma solenaĵo, komence de la Kongreso. La unua el ili, Itacir Luchtemberg, eldiras jenajn trafikajn frazojn:

"Ni ĉiuj estis dum la kongresa semajno viktimoj de la t.n. turismaj pakaĵoj. Tamen, mi havas nun la privilegion, ne plu saluti sed gratuli la partoprenantojn de la 71a UK pro tiu ĉi grandega manifestacio, kiu pruvis — definitive — la universalecon de Esperanto. Mi havas la plezuron prezenti ankaŭ apartan gratulon nome de Brazila Esperanto-Ligo al la ĉina esperantistaro pri ĝia bonega laboro. Ni certe renkontiĝos denove, venontjare, por festi la Jubileon de Esperanto. Ĝis Varsovio!"

Ankaŭ Sabira Ståhlberg, junulino salutanta nome de Esperanto-Asocio de Finnlando, diris: "Dankon pro la agrabla Kongreso!"

Tiuj du malfruiĝintaj salutoj bele resumis la sentojn de la plimulto el la kongresanoj: ni ja spertis

iom da problemoj, sed la Kongreso estas granda kaj memorinda sukceso.

D-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, per iom raŭka voĉo raportas pri la kongresaj laboroj, pri la kunsidoj de la Komitato kaj Estraro. Ŝi eltrovas plian memorindan fakton per atentigo, ke la ĉina esperantistaro post dekjara paŭzo unuafoje denove reprezentigis en la Universala Kongreso de 1978, en Varno, kaj jen, ok jarojn poste, ni havas ĉi tiun grandan manifestacion en Ĉinio mem.

Sekvas tuta ĉeno da kutimaj ingrediencoj de la Solena Fermo: Tonkin prezentas la podianojn (kun aparta atento al la novaj estraranoj kaj la disdivido de la taskoj ene de la Estraro), Milojević anoncas la rezultojn de la Belartaj Konkursoj, Maertens kaj Umeda legas la kongresajn rezoluciojn, Tonkin komunikas la nomojn de la novaj Honoraj Membroj kaj invitas ilin, same kiel la aliajn ĉeestantajjn Honorajn Membrojn, veni al la podio. Tiam la tuta Kongreso per ekstaro kaj silento omaĝas la memoron pri la forpasinta Honora Membro Teo Jung.

La kanada kantistino Joëlle Rabu regalias la ĉeestantojn per majstra interpreto de la kanto *La vivo rozas* de E. Piaff en traduko de C. Piron.

D-ro Tonkin, en parolado kiu sekvis, emfazis kvin prioritatojn en la estonta laboro de UEA: 1) sukceso de la Jubilea Jaro, 2) plibonigo de la administrado en ĉiuj instancoj de la Asocio, 3) aparta atento al la instruado de Esperanto, 4) praktika utiligo de la Internacia Lingvo, 5) ekspluato de la pasintjara Rezolucio de Unesko en nia ekstera agado.

Ankaŭ la nova prezidanto de UEA juĝis la 71an UK esti granda sukceso. Li provis daŭrigi la tradici-

Dum unu el multaj akceptoj tra la semajno (de maldekstre): Chu Tu-nan, Grégoire Maertens, Zhang Qicheng, F. Szabó-Felső kaj Hang Jun (LKK-membro, kiu respondecis pri la Gazetara Servo).



on taŭge epiteti la Kongreson kaj nomis ĝin — jen ŝerce jen serioze — *dikiga* aŭ *bankeda* kongreso (pro la multeco de tiaj aranĝoj tra la semajno), *evolua* kongreso (ne nur pro la evolulando Ĉinio, sed ankaŭ pro la evoluanta Movado), *paca* kongreso (pro la harmonia kunlaboro kaj Internacia Jaro de Paco). Tamen, liaj plej trafikaj vortoj ĉi-rilate estis la jenaj: "Por mi tiu ĉi Kongreso estis ponto. Ĝi estis ponto inter kulturoj; ĝi estis ponto inter vivmanieroj; ĝi estis ponto inter la Nordo kaj Sudo, inter la Oriento kaj Okcidento. Malvasta eble ankoraŭ tiu ponto; malmultaj eble ankoraŭ la esperantistoj. Sed, tamen, tiu ĉi Kongreso kreis tiun ponton, kiun ni sukcesos larĝigi, tiel ke la universaleco al kiu ni sopiras — realiĝu."

D-ro Tonkin finis tiun spontanen paroladon jene: "Kaj fine, karaj gekolegoj, mi memorigu vin pri literumo, en lando kie ne ekzistas literoj. La vorto **laboro** ne havas ses literojn. Ĝi havas naŭ — **kunlaboro**. Ni harmonie antaŭeniru al la Jubilea Jaro, fortaj en homa potenco, fortaj en financa potenco, fortaj en nia spirito kaj en nia animo. Mi estas konvinkita, ke per tiu vojo nia Jubilea Jaro fariĝos la plej granda festo de Esperanto de post la komenciĝo de nia lingvo."

Tiam venis la vico de la dankoj kaj floroj: al la Alta Protektanto, al la Honora Komitato, al la Loka Kongresa Komitato kaj ties helpantoj, prelegantoj, artistoj, antaŭaj estraranoj, al la ĝisnuna prezidanto de UEA, pri kiu Tonkin diris:

"S-ro Grégoire Maertens gvidis UEA tra ses jaroj. Li plivastigis ĝin, li donis al ĝi novan impulson, li kreis pli firman bazon por la Asocio, ne nur finan-

can kaj administran, sed pli fortan el ĉiuj aspektoj. Li kreis belan, modernan Centran Oficejon, kiun vi foje vizitu, kiam vi estos tie, kaj vi estos surprizitaj. S-ro Maertens dediĉis amason da tempo al tiuj laboroj: se ni povus ricevi unu guldenon por ĉiu vojaĝo, kiun li faris inter sia hejmurbo Bruĝo kaj Roterdamo, la Jubilea Fondaĵo estus nun tre riĉa. Per la fakto, ke li nun restas en la Estraro, li pruvas, ke ne temas pri 'prezidanteco kaj helpantoj', sed temas pri teamo, pri grupo de kunlaborantoj, kiuj kunlaboras en la Estraro. Tiun nocion de kunlaboro ni tute ŝuldas al s-ro Maertens, pro kio mi multe dankas al li, nome de ni ĉiuj, pro la laboro dum la pasintaj ses jaroj, kaj mi atentigas lin, ke ni atendas similan laboron en la estonteco."

Reprezentanto de Serbia Esperanto-Ligo (Jugoslavio), d-ro Mika Andrić, transdonis orajn kaj arĝentajn medalojn al ses reprezentantoj de UEA kaj ĈEL. Inĝ. Petar Todorov, nome de Bulgara Esperantista Asocio kaj aparte granda bulgara grupo en la Kongreso, donacis buston de Zamenhof al ĈEL, danke pro la granda kaj sukcesa laboro por la Kongreso.

Sekvis la tradicia transdono de la Kongresa Flago, kiun simbolo faris prof. Chen Yuan, nome de la 71a UK, kaj s-ro S. Świstak, prezidanto de LKK de la 72a UK en la Jubilea Jaro 1987 en Varsovio, kiu promesis, ke Pollando "faros sian eblon por digne akcepti la esperantistaron en la lulilo de la Internacia Lingvo". Post iom da sprita serĉado de la "perdita pianisto", vigla komuna kantado de la Espero signis la finon de la historie gravega 71a Universala Kongreso de Esperanto.

Kongreseroj...

Valizoj de Régulo: Nenio nova en tio, se transfluginte kontinentojn, kun ŝanĝo de aviadilo en tumulta flughaveno, vi konstatas, ke la valizoj ne plu sekvas vin. Prof. J. Régulo Pérez do sentis sin trankvila, kiam post 25-hora flugado de Kanarioj tra Londono al Pekino li fine sidis kun siaj valizoj atendante aŭtobuson por pekina hotelo. Sed ĝuste dum tiu lasta ero de la vojaĝo la valizoj trukis. Tri tagoj necesis por trovi ilin — en apuda konstruaĵo de la hotelo, kie loĝis Régulo.

Zamenhof post Freud: Iuj demandis sin, ĉu d-ro E.J. Lieberman konvertiĝis al spiritismo, kiam ili legis en la Kongresa Libro (p. 33), ke lia IKU-prelego titoliĝas "Psikoterapio: evoluo de Zamenhof post Freud"; ja Zamenhof mortis pli ol du jardekojn antaŭ ol Freud. Pli atenta leganto transsaltis al la sekva linio antaŭ la vorto Zamenhof, kiu celis la salonon de la prelego. Malpli bonŝanca estis la voĉleganto de la sonbenda eldono de la Kongresa Libro, kiu rimarkis la eraron nur, kiam la mistitolo jam estis registrita...

Mono antaŭ renomo: La loĝantoj de la Lago-Hotelo (kategorio D) kaj de la amasloĝejo estis sub (mis)zorgo de la novfondita turisma kompanio Hua An, kiu malobservis pli-malpli ĉiujn interkonsentojn kun LKK. Origine devis temi pri alia, multege pli proksima hotelo, kiu ne postulus, ke la kongresanoj pasigu duonan tagon en aŭtobusoj, kiuj daŭre pendolis inter la hotelo kaj kongresejo, ĉar oni en la hotelo devis ankaŭ tagmanĝi kaj vespermanĝi. Komuna karakterizo de la Lago-Hotelo kaj amasloĝejo estis — malpureco. Ĉu en la miliardkapa Ĉinio kaj en

12-miliona Pekino ne eblis trovi iom da akvo, ŝapo kaj purigistoj? Ĉu temis nur pri la malsperto de la nova kompanio, kiu lerte insistis pri sia altpreza mono? Kial LKK entute negocis kun Hua An? Nu, damne, ĉar ĝia direktoro estas esperantisto. Tamen, ĉiuj suferintoj el la Lago-Hotelo ricevas po 300, kaj ĉiuj klientoj de la amasloĝejo po 80 guldenojn, aldone al la pardonpetoj.

Sen ekstra favoro: La komputilo de UEA bonkondukte kompilis la adresaron de la Kongresa Libro. Pasintjare ĝi elĵetis centon da nomoj, ĉi-foje nur kvin. Kaj tiujn ĝi tre saĝe elektis: tri ĉinojn kaj du finnojn. Eble ĝi volis nur pruvi, ke nek ĉinoj nek finnoj ĝuis pli favoran traktadon flanke de la ĉina LKK kaj finna kongresa administranto...

Kia la nomo, tia la domo: Eĉ se al amasloĝejanoj eble mankis junaĵoj por frandi la faman pekinan anason, ilia sarkasmo ne malhavis kialojn por rebapti la studentan domon, kie ili loĝis — anasloĝejo.

Savo per latino: Unu el la aŭtobusoj por la Diservo, erare iris al katolika preĝejo anstataŭ protestanta. Neniu povis klarigi al la ŝoforo la mison, ĉar tiu parolis nur ĉine. Feliĉe, la pastro de la katolika preĝejo ankoraŭ ĉeestis, kaj usona(!) kongresano trovis kun li komunan lingvon: la latinan, por tiele klarigi al la ŝoforo. Kiu diras, ke la latina perdis sian internacilingvan rolon?

Silko pro devo: S-ino H. de Geus (Nederlando) estis plej ĉine vestita inter la eŭropaj kongresanoj en Pekino — ĉio silka. Ne vere temis pri tia totala prefero al la ĉina vestaĵmodo. Temis pri silko pro devo, ĉar la valizoj de ŝino de Geus definitive perdiĝis jam en Honkongo, antaŭ la ekskurso al Tibeto.

Strekoj gravas: 85-jara kongresanino (kiu tamen sukcesis grimpi al la Granda Muro) kunportis al Pekino kelkdekon da 10-dolaraj vojaĝĉekoj. Kiam ŝi decidis ŝanĝi ilin ĉiujn en Pekino kaj iris al la hotela monŝanĝejo, necesis kompreneble subskribi ilin ĉiujn, tie ĉe la giĉeto. Kvardeko da subskriboj estas ja iom da laboro por 85-jara mano. La ĉinaj bankoficistoj iom longe ekzamenis la subskribitajn ĉekojn, por poste redoni duonon al la posedanto. La problemo estis, ke en la subskriboj tie mankis streketo en la litero t. Strekoj ja gravas, precipe en lando de ideogramoj. Post plenumo de tiu pedantaĵo, ĉiuj ĉekoj estis ŝanĝeblaj.

Pianisto serĉata: Fine de la Solena Fermo prez. Tonkin, laŭ la tradicio, anoncis la Himnon, sed montriĝis, ke mankas pianisto. Tonkin tamen ne volis resti sen La espero sed deklaris, ke li rifuzas fermi la Kongreson, ĉar inter 2000-kapa aŭdantaro devas esti almenaŭ unu, kiu scias pianludi la melodion. Fine tiu estis trovita: oficisto de la universitato de Tonkin ne kuraĝis malobei al sia ĉefo, kaj la Kongreso povis esti fermita.

Varman bonvenon! Tio estis la salutvortoj, kiujn ni aŭdis de ĉinoj en la flughaveno, en la stacidomo, en la hotelo, dum la Inaŭguro, ĉe ĉiu bankedo, ĉe la Granda Muro, ĉie... Fakte, sur la ekstero de la Ĉina Teatro tra la tuta kongresa semajno pendis granda slogantuko kun "Varman bonvenon!" Ĝi pendis tie ankaŭ en la tago de la kongresa Fermo. Eĉ unu semajnon post la Kongreso, kiam la lastaj ekskursintoj estis forlasantaj Pekinon, la ĉinoj "varme bonvenigis" nin. Estas vero, ke ni sentis nin varme bonvenaj en Ĉinio, sed oni tamen tie troigas en la uzo de tiuj du salutvortoj.

Ne la forigo de la nukleaj armiloj kondukos al la paco, sed la paco kondukos al la forigo de la nukleaj armiloj.

(C.H. Townes, nobelpremiito)

Ni ne scias, kiuj vojoj al la paco estas laŭ vi la plej sukcespromesaj. Kaj ni ne scias, kiu el vi jam nun decidis, ĉu li/ŝi informiĝos ankaŭ pri la vojo de la moderna kosmopolita humanismo, t.e. la homaranismo.*

Ni povas imagi, ke eble plaĉos al kelkaj el vi, esplori la riĉajn trezorojn kaj perspektivojn de la evoluanta homaranismo, kaj eble ekkoni kun surprizo, ke en nia movado dormas fortegoj atendantaj vekigon, fortegoj, pri kiuj vi ĝis nun povis nur revii.

Kaj same bone ni povas imagi, ke kelkaj el vi estas ankoraŭ skeptikaj kaj volas nur iomete informiĝi — por eble sperti, ke la homaranismo ebligos multon, kio ĝis nun ŝajnis nebla.

Ĉiukaze ni pretas helpi vin sendante al vi informmaterialon:
**Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg,
FR Germanio.**

* Zamenhof karakterizis la homaranismon jene: "Lingvo internacia havas la celon, krei inter la gentoj neŭtralan ponton en la rilato **lingvo**, la homaranismo volas krei tian saman ponton en **ĉiuj** rilatoj. La homaranismo estas nur plifortigita esperantismo, kaj ĉiuj tion ĉi sentas, kvankam ne ĉiuj volas tion ĉi laŭte diri."

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

DUM LA TUTA JARO JE VIA DISPONO

- ĝiaj kursoj
- ĝiaj seminarioj
- ĝiaj staĝoj
- ĝiaj sportaj
kaj feriaj aranĝoj
- ĝiaj allogaj feri-loĝejoj
kaj gast-ĉambroj
- ĝia tute nova restoracio
- ... kaj ĉefe ĝiaj moderaj prezoj!

Petu detalajn informojn:

Kultura Centro Esperantista

Pf. 771

CH-2301 La Chaux-de-Fonds

tel. (el eksterlando) +41 39 26 74 07

tel. (el Svislando) 039 26 74 07

NOVAJ INFANLIBROJ

verkitaj kaj desegnitaj de Inga Borg:

PLUPO kaj la grupoj, *PLUPO kaj la maro*, *PLUPO kaj la lupoj*. Prezo: 3 libroj 25,00 gld. aŭ 75 SEK + sendkostoj.


PROGRESO ELDONEJO, 59190 Motala, Svedio

Poŝtĝiro 60 77 15-0

Kunkantu — kantu kun ni! La kaseto, kiun oni ludas, kaj ĉiuj tuj kunkantas, ĉar la tekstoj estas aldona. Ideala por grupoj, ekskursoj, kiel donacaĵo por amikoj en la tuta mondo. Enhavas 9 internaciajn kaj 9 germanajn kantojn, kantitajn de Ludwig Fluck (tenoro) kaj Walter Lange (baso). Eldonis Germana Esperanta Fervojista Asocio. Mendoj al Karl Bernhard, Sauerbruckstr. 8, D-6700 Ludwigshafen/Rh. Prezo 15 GM plus 5 GM por 10 tekstfolioj plus 2 GM sendokostoj. Bv. antaŭe ĝiri al konto 953 729 Sparda-Bank Frankfurt/M, kaj menciu celon de la ĝirita mono. Tekstfolioj ankaŭ aparte riceveblaj po 10 ekz. por 5 GM plus 1 GM sendokostoj.

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTERNACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.



DENOVE ESTAS HAVEBLA

La perlo de la finna literaturo

KALEVALA

en la majstra traduko de J.E. Leppäkoski kun postparolo de Vilho Setälä kaj la originalaj bildoj de Akseli Gallen-Kallela en nova kaj luksa grafika aranĝo.

Serio Oriento-Okcidento n-ro 4.

"Tia libro valorigas lerni la internacian lingvon kaj ĝi nepre ne manku en la biblioteko de iu ajn Esperanto-klubo. Individuoj prefere rezignu pri pluraj aliaj libroj" (*Monato* 3/86).

Eldonis: Esperanto-Asocio de Finnlando, Helsinko 1985, 392 p., ilustr., bindita, ISBN 951-9005-51 X. Prezo: 69,80 Gld. aŭ 150 FIM + sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la eldoninto.